

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA

N-ro 615 (2)

Februaro 1957



**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

La 9a Konferenco de UNESKO



*Lic. TIBOR SEKELJ, la observanto de UEA en la 9a
Konferenco de UNESKO, salutas d-ron RADHAKRISNAN,
Vicprezidanton de Hindujo kaj la plej brilan filozoŝon de
la nuntempa Hindujo. (Vidu p. 18)*



ESPERANTO

Februaro 1957

Revuo Internacia

N-ro 615 (2)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O)

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Cion por la redakcio oni sendu al la

Redaktoro: Mag. W. AULD

Knockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrewshire, Skotlando.

* * *

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCI-O, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Girkonto: 378964.

* * *

Ciu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1957): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 10 n.gld.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
		1/16 paĝo	8.— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

P. M. Mabesoone, vic-prezidanto, estrarano pri financoj, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O, Nederlando.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Ing. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex Britujo. Telefono: ARNold 90-81.

ENHAVO

Kion vi atendis? <i>M. H. Vermaas</i>	17
Esperanto en fakaj kongresoj. <i>E. Privat</i>	17
UEA estis reprezentata en la 9a Konferenco de UNESKO. <i>T. Sekelj</i>	18
Ne tro ofte voku „lupojn”. <i>D. Williams</i>	22
Spacfikcio kaj sciencaj faktoj. <i>L. Néret</i>	23
Akceptitaj statutsanĝoj	24
4 poemoj de <i>Baldur Ragnarsson</i>	27

Rubrikoj

Tra la mondo	21
CED	24
42a U.K.	28
Niaj Konkursoj	28
Esperantista vivo & Nekrologo	28
La Juna Vivo	29
Radio	30
La Internaciaj Konkursoj	30
Oficiala Informilo	31

KION VI ATENDIS ?

Kion vi atendis, vi, individuaj membroj de U.E.A. en 1956, pri nia oficejo konstatos en la fino de la jaro ke vi ne renovigis nian membrecon? Kion vi atendis de la Asocio, ke vi ne renovigos ĝin same kiel tion jam faris aŭ baldaŭ faros ĉiuj aliaj individuaj membroj, al kiuj ni jam nun ĉi tie publike dankas pro iliaj fideleco, subteno, kompreno kaj kuraĝigo? Kial vi, al kiuj ni tamen sendas ankoraŭ tiun ĉi numeron, ne apartenas al ili?

Antaŭ unu aŭ pluraj aŭ eĉ multaj jaroj vi aliĝis al UEA, tre verŝajne kun entuziasmo kaj grandaj atendoj de la Asocio. U.E.A. klopodis kaj daŭre klopodadas malgraŭ ege limigitaj rimedoj, plenumi ĉiujn realajn atendojn de la membroj. Ĝi eldonas gazeton, kiu kiel eble plej larĝe respiegulas la funkciadon de Esperanto sur ĉiuj kampoj de la vivo kaj ĝi serĉas rimedojn por ĝia daŭra plibonigo. Ĝi eldonas jarlibron, kiu estas unu el la plej valoraj dokumentoj por ĉiu aktiva esperantisto. Ĝi organizas la Universalajn Kongresojn, kies longa vico fariĝas ĉiam pli impona kaj kiu kulminis en brila evento en Kopenhago, pri kiu multe skribis la tuta dana gazetaro. De jaro al jaro ĝi levas la nivelon de la Internacia Somera Universitato, kiel ankaŭ de la Bel-artaj Konkursoj. Ĝi fondis la Centron de Esploro kaj Dokumentado, kiu evoluis en nuraj kvin jaroj al grava scienca institucio ĝuanta respekton en ĉiaj medioj — ankaŭ en kontraŭ-esperantaj — eldonis kaj kolektis grandan nombron da plej gravaj dokumentoj, entreprenis kaj publikigis plurajn trafikajn enketojn, preparis la tutan sukcesan intervenon en Montevideo kaj konservas daŭre firmiĝantan kontakton kun UNESKO.

Kion vi, al kiuj estas direktitaj tiuj ĉi linioj, atendis pli? Ĉu, kiam vi aliĝis, ravita de la beleco kaj simpleco de la lingvo kaj konvinkita pri ĝia taŭgeco, vi atendis ke ĝia oficiala rekono kaj ĝenerala enkonduko en lernejoj kaj internaciaj renkontoj estos afero de nur kelkaj jaroj? Ĉu vi seniluziĝis, ĉar la Asocio ankoraŭ ne sukcesis tion atingi kaj ĉu tial vi lasos ĝin sen via apogo? Sciu do, ke tiuj atendoj vere ne estis realaj. La Rezolucio de Montevideo estas epokfaranta, ĉar ĝi estas la unua oficiala rekono de la Lingvo Esperanto kaj ĝiaj atingajoj, fare de la plej alta internacia institucio pri Eduko, Scienco kaj Kulturo en la mondo. Sed, estas granda eraro pensi, ke de tiu unua oficiala rekono al ĝenerala enkonduko estas nur unu paŝo! Longega kaj peza estas ankoraŭ la vojo al tiu fina rezulto, sennombraj estas ankoraŭ fortegaj rezistoj venkendaj kaj por tio necesa estas senĉesa kaj senlaca laboro de ĉiuj instancoj kaj funkciuloj de la Movado, kiel ankaŭ de ĉiuj unuopaj esperantistoj. Por povi plenumi tiun laboron, antaŭkondiĉo estas senkompromisa fideleco de ĉiuj membroj.

Ju pli forta estas la Asocio, des pli energie ĝi povas agadi. Laŭ la jaraj statistikoj, nia membronombro kreskas de jaro al jaro per kelkaj centoj. En 1956 per ĉ. 300. Sed en nia oficejo estis enskribitaj dum la sama jaro pli ol 300 novaj individuaj membroj. Sekve, pluraj membroj de 1955 forlasis nin. Tiel okazis ĉiujare. Tio signifas, ke la Asocio estus nekompareble pli forta, se ĉiuj jamaj membroj restus fidelaj, ke multe pli grandajn kampanjojn ĝi povus entrepreni, ke multe pli efike ĝi povus labori por venki ĉiujn barojn, ke, sekve, en malpli fora estonteco ĝi povus atingi la finan celon. Tial, ĝuste tiuj, al kiuj ŝajnas, ke ne sufiĉe rapide evoluas la aferoj, ne forlasu la Asocion, sed male, eĉ pli forte devus ĝin apogi. Ili devus ne ĉesi esti membro-abonanto, sed eĉ, se eble, fariĝi membro-subtenanto, tiel helpante rapidigi tion, kio laŭ ili bezonas rapidigon.

Ke ĉiuj, al kiuj estas direktitaj tiuj ĉi linioj, profunde pripensu antaŭ ol retiriĝi. Ke ĉiuj konkludu, ke tamen valoras jaran kotizon resti fidela al sia iama idealo — kaj sekve al U.E.A., tiel ke fine de la jaro evidentiĝu, ke tiuj ĉi linioj estis direktitaj al neniu...

Marianne H. Vermaas

Esperanto en Fakaj Kongresoj

Profesie la diplomatoj devige scias kelkajn fremdajn lingvojn, ĉar tio estas ofte la ĉefa parto de ilia preparado. Tute alie staras la fakuloj sur malsamaj kampoj. Ili studis kaj studas pli gravajn temojn kaj ne havas tempon por lerni kiel oni papage ripetas unu malriĉan ideon en diversaj lingvoj. Tamen ili sentas ĝenan mankon, ĉar scienco aŭ profesia tekniko ne konas landlimojn kaj ili bezonas nepre kunlabori kun alinaciaj fakuloj.

Modernaj aranĝoj por tradukado en kongresoj kostas multe da mono kaj ankaŭ tie la diplomatoj povas jaluzigi ĉiun alian fakulon, ĉar ili pagas la elspezojn ne per sia propra mono, sed per la nia. Pacon al ili, sed pacon al ni kun permeso!

Do la fakuloj bezonas internacian kongreslingvon, gazetlingvon kaj korespondlingvon. Ĉu ni faru propagandon en iliaj kongresoj kaj ilin tedu per propono de belaj rezolucioj por aldoni ĉiufoje unu plian floron al la granda krono, kiu kuŝas en la tombejo de la tirkestoj?

Post multaj provoj, plej ofte sukcesaj, la sperto kondukis min al konkludo tamen iom negativa tiurilate. La faktoj montris ke la mono, la klopodoj, la energio dediĉitaj al tiuj provoj donas multe pli efikan rezultaton kiam ni organizas mem fakajn kongresojn en normala formo, tio estas teknikaj konferencoj en Esperanto. Cetere la du manieroj ne bezonas kontraŭstari. Ambaŭ rajtas kunekzisti.

Kiom da fojoj ni aŭdas la rimarkon ke nian lingvon uzas neniam kongresoj krom la esperantistaj? Malprava kaj mallogika rimarko, sed ja vera, parte. Tiun ĉi lastan jaron okazis almenaŭ unu katolika kongreso, unu SAT-kongreso, unu fervojista konferenco krom la Universala en Kopenhago.

Generale tiujn kunvenojn organizas la rilata societo esperantista-faka. Tute nature kaj devige.

Sed la unua el la du adjektivoj emas tro manĝi la duan kaj tiel malgrandigi la eksteran efikon. Spertinte tion inter la du mondmilitoj ni provis iom alian metodon. Ni trovis ne-esperantistan fakan institucion por subskribi kaj dissendi la invitojn al samfakaj rondoj, anoncante ke Esperanto estos la lingvo de la kongreso kaj ke nur en tiun lingvon oni tradukos la raportojn eventuale prezentitajn en aliaj lingvoj. Fakaj famuloj lernis mem Esperanton aŭ kunprenis kun si esperantistan tradukiston. Post unu aŭ du tagoj oni aŭdis nur nian lingvon en la kunsidoj, kaj la famuloj fariĝis konvinkitaj amikoj kaj samideanoj niaj, kiel ekzemple la konataj psikologoj Flugel, Baudoin kaj Bovet, profesoroj ĉe nia unua someruniversitato en 1925.

Inter la konferencoj organizitaj laŭ tiu ĉi modelo inter 1924 kaj

1930, ni citu la konferencojn de radio-inĝenieroj en Genevo, radio-amatoroj en Parizo, pro-pacaj edukistoj en Praha, pro-pacaj religiuloj el diversaj eklezioj en Hago, Komercaj Ĉambroj en Venetio, turistaj oficejoj en Parizo, k.t.p. Tiaj kunvenoj nun devus reokazi kaj ankaŭ novaj similaj.

Ne forgesu la preparan efikon ĉe la neesperantistaj fakaj rondoj, kiam ili ricevas oficialan inviton de konata institucio al kongreso uzanta nian lingvon. Pripensu la efikon ĉe la partoprenantoj aŭ observantoj, kiam ili konstatas surloke la bonan kaj agrablan funkciadon per komuna lingvo. Anstataŭ esti iom teda, iom ridinde propagandema malplimulto en ekstera kongreso, ni estas mastroj kaj plimulto en tiaj konferencoj, tute renversita situacio. Poste la gazetaro, ĉu taga, ĉu faka, devas rakonti la novaĵon.

La kondiĉo kompreneble estas, ke ni havu sufiĉe da seriozaj fakuloj por raporti kaj diskuti. Nuntempe la instruistoj estas videbla nia plej forta grupo, kaj ili povus tre facile sukcesigi konferencon pri instruado de senpartia Historio, pri antaŭjuĝoj rasaj, aŭ pri internacia korespondado de geoknaboj. Du famaj institucioj emus subskribi invitojn se la faka esp. asocio farus la organizon laboron. Ĉu ni ne baldaŭ ebligos tion? La moderna metodo ja ne favoras tre grandajn stud-kunvenojn, sed konferencojn malpli multnombrajn de interesitoj, kiuj deziras interŝanĝi spertojn. Se oni deziras pli vastan kongreson, oni povus kunvoki la gepatrojn por diskuti edukmetodojn! Pri tio kaj similaj eblaĵoj bonvolu serioze pripensi. La uzo de nia lingvo por utilaj celoj restas ja la fundamenta programo de UEA. **Edmond Privat.**

UEA ESTIS REPRESENTATA EN LA 9-a KONFERENCO DE UNESKO

(Objektiva informo . . . kun kelkaj parentezoj)

El Istanbul mi ekveturis per aŭtomobilo, kiu jam delonge vagadas tra la mondo sub la signo de la verdstela flago. Akompanis min la APO-kunlaborantino, f-ino Elsie Parson, kaj amaso da valizoj kaj ses skatoloj da esperantaĵoj. La celo estis New Delhi, por reprezenti UEA-n kiel observanto antaŭ la IX-a Konferenco de UNESKO.

Ĉiuj, kiuj aŭdis pri la entreprenota vojaĝo avertis nin pri la tre malbonaj vojoj kaj aliaj malfacilaĵoj. Tamen, la vojaĝon tra Turkujo ni sufiĉe ĝuis. (Nur unufoje oni devis eltiri la veturilon el fosajlo!) La montara regiono de la norda Turkujo estas bela, la Nigra Maro per tre bluaj ondoj salutis nin, kaj la neĝkovrita Ararat igis nin rememori praajn epokojn. Ni eniris Iranon. La vojoj iĝis malbonaj kaj malbonegaj. La jam mizeraj pneŭmatikoj nun tute eluziĝis kaj krevadis unu post la alia. La malmultaj birdoj de la Iranaj dezertoj rememoros min sidantan apudvoje flikantan la radringon aŭ pum-pantante ĝin alterne kun f-ino Parson. Tio ege malrapidigis la vojaĝon (kaj plirapidigis la forpason de la tempo!). Finfine la stato de la veturilo estis tiel malbona, ke la lastajn tridek kilometrojn antaŭ Teheran ni devis esti tirataj de helpkamiono.

Tamen ni alvenis al Teheran. La nova delegito de UEA, d-ro Parviz Zolejn afable invitas nin loĝi en la domo de lia familio, kion ni volonte akceptas. Estis tiu ĉi la unua okazo al la delegito „ekfunkcii”. (Kaj li faris tion bonege!) Ankaŭ s-ro Ŝidani, la

malnova delegito, gastigas nin.

Mi sukcesas vendi kelkajn artikolojn al iu revuo en Teheran, sed ilia prezo ne sufiĉas por aĉeti novajn radringojn. Ne restas alia alternativo, ol forlasi la veturilon — je zorgo kaj uzo de la delegito — kaj daŭrigi per aŭtobuso.

Dum kvin tagoj ni busveturas tra griza polvdezerto. Maŝad, vojmeze, kun la tombo de unu el la disĉiploj de Mahometo, altiras buntan amason da pilgrimantoj, el ĉiuj mahometanaj landoj. Mi apenaŭ sukcesas enŝovi min en la sanktejon, kie derviŝo devigas min kliniĝi kaj ripeti koranajn suraĵojn.

La sekvantan tagon ni preterpasas la brilan bluan kupolon de la tombo de Omar Ĥajjam . . . (Ho, poeto, kiel vi povis havi tiel belajn revojn en regiono, kie vino ne ekzistas, rozo ne floras, kaj la virino estas nur divenebla malantaŭ densa tavolo de diversaj tukoj?!)

Ni eniras Pakistanon per la „trajno de la kontrabandistoj”. La plejparto de la kunvojaĝantoj ne pagas bileton, nur etan trinkmonon al la kontrolisto. (La kontrolisto klarigas: „Ili estas nur malriĉaj kontrabandistoj. Se ni postulus pagon, ili nenion gajnus per siaj vojaĝoj!”) Ŝanĝiĝas la monunujo, la lingvo, la manĝaĵoj, kiujn ni akiras ĉe la stacidomoj. Iom ankaŭ la vestoj de la kunvojaĝantoj. Post tri tagoj ni estas en Hindujo, kaj la kvinan elvagoniĝas en New Delhi.

Post enhoteliĝo, konscienca baniĝo (ĉu vi dubas pri ĝia bezono?) kaj ioma ordigo de la vestaĵoj, mi

ekserĉas la konferencojn de UNESKO. Belega nova konstruaĵo, ĵus finita. Grandioza salonego. Sur aliaj du etaĝoj pluaj kvin pli malgrandaj konferencoj, pluaj tri fumsalonoj, centoj da oficejoj, ejoj por diversaj teknikaj servoj. Ĉirkaŭ la konstruaĵo flirtas la flagoj de la 79 nacioj-membroj. Oni instalas la okdekan, de la ĵusakceptita Sudano.

La sekvantan labortagon mi ricevas la insignon de UNESKO, kiu rajtigas al multaj privilegioj dum tiu ĉi monato. Kelkaj leteroj kaj amaso de paperaĵoj atendas min. Post rapida studo de la paperoj, mi direktas min al la kunsido de la Programkomisiono. Ekde tiam mia konstanta loko estas tie, malantaŭ la surskribo „Neregistaraĵ Organizo“.


Mia anstataŭanto, s-ro Sinha, informis min, ke li ne povos ĉeesti, pro delikata sanstato. F-ino Parson nur dufoje vizitas la Konferencon. Do mi estas la sola esperantisto tie. Mi klopodas malkovri konatajn vizaĝojn. La unuaj, kiujn mi povas saluti estas prof. Rivet, la franca antropologo, la turka profesoro Tuncel, kun kiu mi amikiĝis en Ankara, d-roj Avidor kaj Alon kiuj antaŭ nelonge akceptis min en Izraelo. Jugoslavo, argentinano kaj kubano ankaŭ konis min, kaj la rondo de geamikoj rapide kreskas. Finfine, tio estas mia tasko: amikiĝi.

Inter la unuaj mi estas en la konferenceto, kaj inter la lastaj foriras. Kompreneble. Mia ĉefa laboro ja malvolviĝas antaŭ kaj post la kunsidoj. Kun la latinamerikanoj mi rememoras travivaĵojn kaj amikojn el ilia lando, la nepalano estas kontenta pro mia entuziasmo pri lia lando, kun la birmano ni diskutas lingvan problemon, kun la aŭstro ligas min antropologio, kun unu el la ĉeĥoj ni priparolas nian komunan naskiĝlokon, al la germano mi montras foto-kolekton, la meksikaninon volonte akompanas al danĉprezentado...

La kunsidoj estas matene kaj posttagmeze. Dum la vespero akceptas nin la Vicprezidanto, la Ĉefministro, la Edukministro, la Ĝen. Direktoro de Unesko, pluraj ambasadoroj, oni regalas nin per



La inaŭguro de la 9a Konferenco de UNESKO, en la ĵuskonstruita Vigyan Bhawan, en New Delhi.



La parlamentejo de Hindujo en New Delhi

prezentado de hindaj dancoj, koncertoj, filmoj, ekspozicioj.

La 27-an de novembro la grava ĵurnalo „The Statesman“ publikigis sur la 3-a paĝo, en la rubriko „Hieraaŭ en Delhi“, dukolonan intervjuon kun mi, dediĉitan al Esperanto. Tiun honoron havis nur 30 el la 500 delegitoj dum la Konferenco. Ĉe mia alveno al la konferenceto, multaj ridetantaj, afablaj delegitoj alproksimiĝis al mi, parolante kaj demandante pri E. Multaj homoj ne nur estis rimarkintaj la artikolon, sed finlegis ĝin, kaj pluraj el ili kun simpatio kaj aprobo komentariis.

Tiu ĉi fakto ege kuraĝigis min. Diversaj ideoj ekflirtis en mia menso. Dum la antaŭaj tagoj, kiam oni diskutis pri „kulturaĵ rilatoj“ kaj pri „inter-nacia kompreniĝo“, fojfoje mi sentis la bezonon laŭte ekkrii: „Gesinjoroj, ĉu vi estas blindaj? Kiel vi imagas ĉion ĉi sen Esperanto...?“ Sed perforte mi altrudis al mi silenton. Kion mi povas fari nun, kiam temas pri „helpo al aridaj zonoj“ kaj „oceanografaj studoj“? Tamen poste mi malkovras alian punkton traktotan: „Interŝanĝo de personoj“. Ĝi ne estas la ĝusta loko, sed... la sola ŝanco.

Posttagmeze Budao-jubilea festo, en ĉeesto de Nehru kaj la dalai-lamao, kiel gasto. Tie mi estas. Lumoj antaŭ la okuloj kaj ideoj kirliĝantaj en la kapo. Kaj dum la lasta enkarniĝo de Budao paroladas (senerare li parolas la tibetan lingvon!), sur la dorsflanko de la invitilo mi formulas proponon pri rezolucio koncerne eksperimentan instruadon de E. en 15 lernejoj diverslandaj.

Por ke estu prezentata la propono, iu delegacio devas ĝin adopti. Kaj eĉ tiel, mi bone konscias, en la plej bona kazo povas rezulti nur „rekomendo“, kaj ne „rezolucio“, ĉar ĝi ne estis prezentita skribe almenaŭ dek tagojn antaŭ la diskuto.

Multaj el la delegitoj aprobas la ideon kaj promesas apogon, sed neniu kuraĝis aŭspici ĝin sen koni la opinion de sia registaro. La finna edukministro, d-ro Virolajnen, treege favore esprimis sin pri E., sed bedaŭrinde, li jam estas for. Fine d-ro Barrios el Nikarago akceptas prezenti la projekton. Apogos ĝin tutcerte la delegitoj lizna, hinda, jugoslava, aŭstra, urugvaja, meksika, ar...

tina, venezuela, panama, franca, irana, birma, ĉeĥa, ekvadora, svisa kaj nepala. Certe ankaŭ pluraj aliaj, kiujn mi ne havis tempon kontakti.

La diskuto pri aliaj temoj trolongiĝas. Fine la 3-an de decembro Barrios forveturas, kaj mi ne sukcesas trovi alian patronon. La tuta ideo falas kvazaŭ ludkartkastelo.

Posttagmeze mi ekscias, ke dum la matena kunsido la Plenumkomitato diskutis pri la problemo de internacia lingvo kaj faris decidon. Mi kuras al la oficejo de s-ro Coeytaux, sekretario de la Plenumkomitato. Li informas min. La Raporto de UEA al la Ĝenerala Direktoro de Unesko pri la aktivecoj de UEA estis multobligita kaj disdonita al la 22 membroj de la Plenumkomitato, kaj post diskuto de la afero oni decidis laŭvorte la jenon:

„Post noto de tiu aserto (de UEA), la Plenumkomitato invitis la Ĝeneralan Direktoron konsulti la Internacian Konsilantaron por Filozofio kaj Humanistaj Studoj (ICPHS) pri la ebleco entrepreni, je peto de UNESKO, objektivan studon de helplingvoj kaj bazaj lingvoj, kaj la rolo, kiun ili povus ludi en la internaciaj rilatoj.”
(Journal no. 21. Executive Board, 45th session.)

Tamen, kiel okazis la afero? Pasis pluaj du tagoj ĝis kiam mi povas ekhavi detalojn pri la kunsido. El ĝia multobligita resumo evidentiĝas, ke la sola diskutanto estis la dana prof. Nielsen. Resume, li rekonas la urĝan bezonon de komuna esprimilo por la internaciaj rilatoj, sed li dubas ke iu el la nunaj provoj taŭgas. Legante la Informon — li diras — li ricevas la impreson, ke UEA laboras nur por Esperanto, kaj ne por Unesko. Laŭ li alvenis la tempo por forigi la temon el la sfero de propagando, kaj meti ĝin en la sferon de scio. — La Ĝen. Direktoro esprimis sian timon pro la elspezoj, sed li proponis sin por konsulti ICPHS pri la ebleco entrepreni tian projekton, kun konsidero de la financa aspekto por la venonta budĝeto. Li petos ankaŭ, ke ili preparu laŭeble plej multe de tiu laboro nepetante plialtigon de subvencio.

Mi tuj skribe petis parolrajton dum la venonta sesio de la Plenumkomitato. La sekvanta kunsido okazis la 6-an, post la forveturo de ĉiuj aliaj delegitoj. Ĉar dum tiu kunsido nova prezidanto estis elektota, mi ne sciis, ĉu mi ricevas parolrajton aŭ ne. La tuta mateno pasis en proceduraj diskutoj. Posttagmeze oni daŭrigis longajn, lacigajn diskutojn. La novelektita prezidanto, italo, d-ro Veronese, sendas al mi mian hispanlingvan petskribon, kun la franca demando: „pri kio vi deziras paroli?” Mi reskribas france: „Mi deziras doni kompletigan klarigon al la diskuto pri internacia komprenilo.” Mi aldonas: „Mi parolos mallonge.” Jam estas ĉiuj lacaj, estas la sepa vespere. La prezidanto sendas la sekretarion por demandi min, ĉu ne estus same se mi skribe transdonus kion mi volas diri. Ne, ne estus same! Fine, je la oka vespere li donas

al mi strikte 5 minutojn. Mi eklegas hispane.

Post danko al la prezidanto mi esprimas la kontentecon de UEA pro la entreprenota objektiva studo de la afero.

Se iu ajn, sed „precipe dano” dezirus ekscii ion pri la eblecoj de Esperanto, li povis ĉeesti nian ĵusan Kongreson en Kopenhago, ĝiajn kunsidojn, la prelegojn de ISU, ktp. (mi donas pluajn detalojn), kaj povus konvinkiĝi, ke ni ne laboras nur por Esperanto, sed por la samaj celoj, por kiuj Unesko laboras: internacia interkompreniĝo, homa solidareco, diskonigo de kulturo kaj sciencoj.

Por doni pluan elementon por la entreprenota objektiva studo, UEA intencas — mi diris — entrepreni, konsente kun la edukaj aŭtoritatoj diverslandaj, eksperimentan instruadon de Esperanto en po unu klaso de po unu lernejo en 15 landoj (proksimume), dum la laborjaro 1957/58. Ni invitas la Ĝeneralan Direktoron 1) sendi sian observanton al nia proksima Kongreso en Marsejlo, 2) sendi sian kompetentan observanton, aŭ tiun de iu de li delegita institucio, por ĉeesti la kunvenon de la infanoj, per kiu finiĝos la eksperimenta instruado de E., por observi la influon de la instruado de neŭtrala lingvo, el vidpunktoj lingva, socia, eduka kaj de homa solidareco.

„Ni notas kion vi diras,” rimarkis la prezidanto senpacience, kaj pasis al alia punkto.

Tamen, la efiko de la parolado ne malaperis. Post unu horo, kiam la kunsido finiĝis, pluraj el la delegitoj alproksimiĝis al mi por proponi sian helpon se estus necese por la atingo de nia celo.

Estas tro frue ankoraŭ, por povi juĝi la ĝustan valoron de la nova decido de UNESKO, kaj precipe mi ne povas ĝin juĝi, pro troa proksimeco. Sed mi povas antaŭdiri, ke dum la proksima periodo ni estos sub granda lupeo de kritikaj observantoj.

New Delhi, decembro 1956.

Tibor Sekelj

En Japana Lernejo



Klubanoj de Ikuno Altlernejo, Osaka, Japanujo, okaze de la Ekspozicio dum lerneja festo, la 14an de oktobro 1956. Gvidanto: s-ro Okumura-Kinzo.

Tra la Mondo

• La 14a de decembro estis por la esperantistaro de Nürnberg kaj Fürth memorinda festotago. La Fervoĵista Esperanto-grupo invitis la Esperanto-grupon Nürnberg kaj la Esperanto-grupon Fürth kune soleni la Zamenhof-Feston kaj la Tagon de la Homaj Rajtoj. S-ro Gossman, la estro de la Fervoĵista Grupo, salutis la gastojn kaj la reprezentanton de la fervoĵa direkto, kiu favoras la internacian lingvon. Li ĝojis, ke la juna Fervoĵista Grupo, aĝa iom pli ol unu jaro, povas gastigi la plej maljunan Esperanto-grupon en Nürnberg, fondita en decembro 1888. La festparoladon faris s-ro Otto Pilhofer, la prezidanto de la Esperanto-grupo Nürnberg. Li akcentis, ke Zamenhof donis al la mondo ne nur la lingvon internacian, sed ion pli valoran: la ideon, ke ni esperantistoj en la tuta mondo estas gefratoj. Li akcentis ankaŭ, ke la Tago de la Homaj Rajtoj estas memorinda, ĉar laŭ la statuto de UEA „la respekto de la Homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo“.

• Okaze de la naskiĝdatreveno de Zamenhof, la esperantista societo en Jambol (Bulgarujo) — kiun la 23a bulgara esperanto-kongreso honoris per la titolo „Modela Societo“ — organizis solenan manifestadon, kun prelego de s-ro Al. Blagoev kaj konvena literatura kaj muzika programo plenumita de la kursanoj kaj artistoj de la loka popola teatro.

• La islanda literatura revuo „Birtingur“ prezentis en sia numero 4 de 1956 artikolon pri la esperantistaj verkistoj, tradukon de la XXIIa ĉapitro de „La Infana Raso“ de William Auld, artikolon pri Adam Mickiewicz, kaj tradukon el „Pan Tadeusz“ (Sinjoro Tadeo) — ĉiuj estis verkitaj de nia samideano Baldur Ragnarsson (Reykjavik).

• La spiritisma revuo „Novo Horizonte“ (Rio de Janeiro) n-ro 13 presigis kvar paĝojn en Esperanto: dupaĝan artikolon de s-ro Ismael Gomes Braga kaj du paĝojn da poezio de s-ro Geraldo Mattos.

• La gazeto „La coopérateur suisse“ (Bâle) aperigis en sia n-ro de 15 decembro 1956 artikolon „La konsumkoopero en Finnlando“, aperinta en „Norda Prismo“, en franclingva traduko de s-ro Pavlos Giannelias.

• „Die Katholische Schule“ (Bayern) en siaj numeroj 20 kaj 21, 1956, aperigis artikolon „Esperanto braucht einen Platz in unserer Schule“ de s-ro Max Mielert.

• Multaj priesperantaj artikoloj aperis lastatempe en la pola gazetaro. La ĵurnalo „Ilustrowany Kurier Polski“ regule dediĉas spacon al raportado pri okazintaĵoj en la Movado en- kaj eksterlanda.

• Post multjara dormado reaperis en Recife, Pernambuco, Brazilo, la oficiala

organo „Pernambuco Esperantista“ de Pernambuca Esperanto-Asocio. La dua numero de la nova serio estas tre bele farita, sur bona papero, kaj montras la lertecon de la nunaj gvidantoj.

• La itala societo „Dante Alighieri“ donis antaŭ nelonge sian oran medalon al d-ro Immanuel Olsvanger en Jerusalemo por lia traduko de la „Dia Komedio“ en hebrean lingvon. Nehru, prezidanto de Hindujo, sendis al tiu poeto dankan leteron por la nova traduko de la antikva hinda eposo Bhagavad Gita, kiun redonis Olsvanger hebrelingve laŭ la sanskrita originalo. D-ro Olsvanger estas konvinkita esperantisto kaj uzas ĉiun okazon por akcenti la signifon de nia lingvo. Li estas aŭtoro de esperanta poemkolekto „Eterna sopiro“, aperinta en 1925.

• Reaperis en Rio de Janeiro, en tre modesta vesto, la oficiala organo „Rio Esperantista“ de Esperanto-Asocio de Rio de Janeiro. La estraro promesas baldaŭ plibeligi ĝin.

• En sep starantaj vitrinoj sur ĉefa strato de Varsovio estas aranĝita propaganda ekspozicio. Ĝi trafas informas la trapasantojn pri Zamenhof, esperanta



Juan Régulo Perez ĉe katedro de la Universitato en La Laguna, la 6an de novembro 1956, kiam li inaŭguris la novajn esp-kursojn organizitajn de la Universitato.

kigis recenzon de XVII Hispana Esperanto-Kongreso kaj de XXVI Kongreso de IKUE. La gazeto publikigis Esperante la tutan paroladon de Pastro Beckers, prezidanto de IKUE. Esperantistoj, precipe instruistoj, gratulu kaj kuraĝigu: S-ron Joaquín Solana, Direktoro de Escuela Española, calle Mayor 4, MADRID, Hispanujo.

• En aprilo 1956 laŭ iniciato de prof. J. Toczyski, estis revivigita en Gdansk filio de la pola landa Asocio. Klubo de Kulturlaborantoj (profesia asocio de ĵurnalistoj, teatrartistoj, pentristoj, k.s.) afable disponigis ejon dufoje en la semajno. En oktobro komenciĝis 10 diversaj kursoj.

• Fraŭlino Colette Llech-Walter, filino de la Estrarano de UEA, sukcesis antaŭ la juĝantaro de la Beletra Fakultato la ekzamenojn pri Beletra Licencio. F-ino Llech-Walter gvidas Esperanto-kurson ĉe la Supera Komerca Lernejo en Montpellier.

• Nia agema Estrarano de UEA kaj Vic-Prezidanto de UEF, s-ano René Llech-Walter, faris dek prelegojn kaj dek provskizojn pri la esperanta gramatiko al pli ol 3,000 personoj, inter la fino de oktobro kaj la komenco de novembro 1956.

• La Esperanta Fako de C.E.P. en Sta. Coloma de Gramanet (Barcelona) organizis de la 5a ĝis la 7a de septembro 1956, esperantan manifestacion, kiu montris kolektojn de infandeseĝnaĵoj el 12 landoj kaj esperantajjn.



literaturo kaj gazetaro. La ekspozicion aranĝis Cefa Estraro de Asocio de Esperantistoj en Pollando.

• La organo „Esperanto Triumfanta“ de Esperanto-Societo en Minas Gerais, Brazilo, aperas ĉiam kiel bela ilustrita dulingva revuo. Tiu ŝtata societo progresas rapide: nun ĝi aĉetis sian propran sidejon en konstruata nubskrapaĵo en Belo Horizonte, kie baldaŭ ĝi funkcios.

• Hispana instruista gazeto „Escuela Española“ eldonita en Madrid, publi-

NE TRO OFTE VOKU „LUPOJN”

de

Denis Williams

Estis Miŝra, la maljuna lupino, kiu unue faris la proponon; Miŝra la kaŝema, la ruza. Nur ŝi sufiĉe konis la kutimojn de la homoj.

Jam dum tagoj ŝi observis la vilaĝon; tagoj senpaciencaj; tagoj en kiuj la luparo sentis mordi la fruan vintran venton; tagoj en kiuj la malvarmo batalis kun malsato ĉe ŝia flanko.

Ĉian nokton la luparo interkonsiliĝis sub la kolore luma kurteno de la nordo, kaj Miŝra faris sian proponon. Ĉiun nokton la junaj bravuloj de la luparo blekegis sian mokridegon; iliaj faŭkoj leviĝis al la luno. Ĉiun nokton Miŝra akceptis sian malsukceson kun sia larĝa kaŝa ridetaĉo. Ŝi atendi povis. Nokton post sekvanta nokto la malsatodoloro plifortiĝus kaj la agbezono fariĝus pli urĝa.

Balaj, estro de la lupoj, konsentis kun ŝi, sed li, ekscitiĝema, multfoje cedis antaŭ la bruegado de la junuloj.

Manĝaĵo pli maloftiĝis. La malgrandaj bestoj kaŝiĝis. La pli grandaj pli singardis. Sed tie mal-supre en la valo, kie ankoraŭ verdis la kampoj, sin paŝtis ŝafoj, grasaj ŝafoj, pli ol sufiĉe. Nemire ke okuloj rigardis sopire kaj buŝoj salivis.

Dum jaroj Miŝra jam observis. Ŝi jam vidis la knaboj-gregistojn, aŭdis la avertokriojn kaj rimarkis la virojn lasi la laboron ĉe la kampoj rapidante por protekti la ŝafaron. Multfoje ŝi vidis la knabogregistojn batitaj kiam ili timante rekuris al la vilaĝo, lasante la ŝafaron negardita, aŭ, pro neatento al sia tasko, lasis vagi ŝafojn.

Miŝra estis saĝa. Ofte ŝi pasintecce profitis pro sia saĝeco. Estis ŝi kiu sciis ke knabogregisto kiu fajfas kaj kantas la tutan tagon lasus vagadi la ŝafaron. Ŝi mem jam ofte ĝuis bongustan ŝafideton pro tio. Ŝi konis ankaŭ la timemulojn kiuj ploris; kiuj forkuris hejmen plorante, lasante la aron al Miŝra kaj la lupoj.

Sed ĉi jare Miŝra konfuziĝis. Sendube ŝi troaĝiĝas. Tiun ĉi jaron la knabogregisto nek kantis, nek fajfis, nek ploris. Ĉi jare

la knabo rigardis sentime al la arbaro ĉirkaŭ si. Li lasis neniun ŝafon vagi. Trifoje li jam avertis la vilaĝon, dufoje oni batis lin. Miŝra mem vidis kaj ne komprenis.

Malrapide en la menso de Miŝra kreskis ideo. La knabogregistoj kiuj ploris, timis pri tio, kion oni povis vidi. Tiuj, kiuj kantis pripensis nek la lupojn nek la ŝafojn. Sed ambaŭ elkriegis kiam ili vidis la luparon. Ne, ili elkriis se ili vidis ke nur unu lupojn proksimen rampis.

Tiu ĉi knabo devus timi al la lupoj, Miŝra diris al si. Ŝi promesis la luparon ke ili ĝissate manĝos se ili al ŝi aŭskultos. Dek devas sekvi ŝin kaj ŝin obei. La ĉasantoj devas esti dek de ŝi elektitaj, spertaj lupoj, maljunaj kiel ŝi mem. Multaj en la luparo disputis ŝian elekton, kaj la junaj lupoj proklamis sian malkontenton ĝis malfrue en la nokton. Sed fine eĉ tiuj komprenis ke ŝia propono estas bona; almenaŭ se ĝi malsukcesus, nur la maljunaj lupoj perdiĝus.

Miŝra sciis ke ŝi povas fidi al la dek elektitoj. Zorge ili rampis malsupren al la valo. Silente ili prenis lokojn ĉirkaŭ la ŝafaro. Miŝra observis la knabon. Branĉeto kraketis sub ŝia piedo. Ĉe la signalo la dek movis malrapide antaŭen en la kampon; sen rapidigo, ridetante kiel nur lupoj povas rideti.

Dolĉa „Uu-u” de Miŝra atentigis la knabon. Timo saltis en liajn okulojn. Li ne hezitis. Verkiante per laŭta voĉo li kuris vilaĝen.

Tuj kiam li forkuris Miŝra sin turnis por reiri al la arbaro. La dek aliaj devus fari same sed unu prokrastis, venkita de la ŝafodoro.

Miŝra diris al li ke li estas sensaĝulo. Ĉu li neniigus ŝian planon? La alia rikanis respondante ke lia ventro deziregas karnon, kion signifas ŝia plano. Ĉu lupoj

rifuzas karnon ĉar maljuna lupino tion diras?

Ili povus havi la tutan ŝafaron se li agus laŭ la plano, Miŝra pacience rediris. Ĉu ŝi devas denove klarigi la planon?

Vortoj! la alia rediris kun kolera malico. Jen la karno! Sed lia kolero droniĝis en la bruego de la vilaĝo.

Miŝra urĝis ke li rapidu, se li ne venus rapide la afero fiaskiĝus.

Nevole la lupoj ŝin sekvis en la arbaron.

El siaj kaŝejoj la lupoj observis la vilaĝanojn alproksimiĝi. La knabo embarasite montris al la arbaro. Viroj kuris tiudirekten; haltis; returnis sin kaj rekuris kaj punbatis la knabon pro lia mensogo.

Trifoje Miŝra kaj ŝia dek iris antaŭen por timigi la knabon. Trifoje la knabo kun timo en la okuloj kaj larmoj sur la vangoj kuris al la vilaĝo. Trifoje oni batis lin; ĉiufoje pli severe ol antaŭe.

Tiam Miŝra vokis al la luparo ke ili estu pretaj. Kvaran fojon ŝi kaj la dek antaŭeniris al la ŝafaro. La knabogregisto staris, ŝtonigita de teruro, ŝirita inter sia timo al la lupoj kaj sia novetrovita timo al la vilaĝanoj. Premtenante sian bastonon li antaŭen paŝis al siaj turmentantoj kaj frapis kun sia tuta forto al la plej proksima. La lupoj ricevis la baton kaj falis.

Miŝra rimarkis kun sekreta plezuro ke estis tiu, kiu insultis ŝin pri la plano, tamen ŝi saltis al la gorĝo de la knabo kaj silentigis lin.

La luparo tiam sinŝutis en la kampon. Rapide ili buĉis sen kompto.

Tiun nokton la regalo estis abunda. Granda estis la ĝojo inter la lupoj. Laŭte la junaj lupoj laŭdis la lertecon de Miŝra, sed neniun sciis kial ŝia plano sukcesis kaj Miŝra mem ne povis al ili tion diri. Ŝi estis silenta. Ŝi tro sukcesis.

Plena de triumfo pro la rezulto de ŝia plano, Miŝra sentis juneccon ondadi tra siaj maljunaj artorioj. Kun la junaj lupoj ŝi regalegis sin al trosatiĝo. En malsaĝo ŝi jam mortis.

Vendredon la 21an de septembro 1956, delegitoj al la Internacia Aeronautika Kongreso en Romo, Italujo, spertis memorindan travivaĵon. Ili ĉestis montradon pere de s-ro S. J. Gerathewohl de filmo, kiu estus povinta titoliĝi „*La konturoj de la estonteco*” aŭ „*Tio okazis morgaŭ*”, ĉar ĝi estis filmita en aeroplano en kiu la gravitofikoj estis tute nuligitaj. Objektoj kaj personoj en la aeroplano estis tute senpezaj, kaj plej malgranda puŝo kaŭzis, ke ili ĉirkaŭŝvebis en la spaco. Kiam oni renversis botelon da akvo, eĉ ne unu guto elverŝiĝis.

Tamen tio ne estis fikcia filmo atingita per fotografia prestidigito, sed efektiva registro de interesa eksperimento, en kiu s-ro Gerathewohl mem ludis ĉefan rolon. Dum 47 sekundoj li kaj aliaj en la aeroplano estis submetitaj al la eksterordinaraj efikoj de gravitomanko. Tiun fenomenon oni kreis, direktante jetaeroplanon en zorge kontrolatajn plonĝojn kaj parabolojn, tiel ke la centrifuga forto egalas la gravitan forton.

Tiu rimarkinda filmo plifirmigis impreson inter la delegitoj, ke grava paŝo estas farita al la konkero de ekstera spaco. La eksperimento fakte rekreis artefarite unu el la fizikaj kondiĉoj ekzistantaj en la spaco, kaj jam estas homoj, kiuj spertis kelkajn el la sensaĵoj, kiujn spertos interplanedaj esploristoj dum la jaroj venontaj.

Astronaŭtiko multe evoluis de post la unua eksperimento per senhomaj instrumentoportantaj raketoj; la proksima stadio estos lanĉado de artefaritaj teraj satelitoj, kiuj ĉirkaŭirados nian planedon; kaj en la antaŭvidebla estonteco oni verŝajne sukcesos lanĉi homportantan sateliton kaj ekspedi senhoman raketon ĉirkaŭ la lunon. Post tio, spekulativo serioze komenciĝas, sed, kiel diris la prezidanto de la Itala Raketa Societo ĉe la roma kunveno: „Tiu ĉi Kongreso metis la fundamentan ŝtonon de la plej grandioza konstruaĵo iam konceptita de la homa menso”. Kaj Papo Pius II, alparolante la kongresanojn dum privata akcepto ĉe Castel Gandolfo, diris: „Kvankam scienca esplorado estas la tuja pravigo de la paca uzado de raketoj, tio estas nur unu stadio en viaj klopodoj al pli grava celo — interplaneda flugado”.

La Roma Kongreso faris imponan bilancon de esplorado kaj atingoj. Kvarcent delegitoj el 23 landoj, kiuj reprezentis 10,953 sciencistojn kaj teknikistojn sin okupantajn pri astronaŭtika esplorado, partoprenis la kunvenojn, kie la baza koncepto estis internacia kooperado por antaŭenigo de la scienco. Neniu scienco estas pli internacia ol astronaŭtiko: la artefaritaj satelitoj, spacaj stacioj kaj spacoŝipoj de la estonteco neeviteble trapasos super la teritorioj de multaj nacioj. Krome, neniu alia grand-skala scienca ekspedicio iam ajn postulis tiom da komuna klero kaj klopodado. Ĉe la Roma Kon-

greso, pli ol dekdu tezoj pritraktis la spacan stacion, kiu orbitos ĉirkaŭ la teron, kaj diskutis tiajn ege teknikajn detalojn, kiel ekzemple la pezon de la stacio, ĝian kunmetadon en la spaco, ĝian orbiton kaj la fizikajn kondiĉojn de vivado en ĝi.

Spacoŝipoj por interplaneda vojaĝado estis pristuditaj en 13 aliaj tezoj. La sciencistoj ĉefe koncernis sin pri la speco da motoro, kiu plej bone taŭgos por tiuj veturiloj, kiuj devos trairi grandegajn distancojn kun tre malpeza brulaĵo.

Finaj preparoj por la lanĉado de artefaritaj satelitoj dum la venonta Internacia Geofizika Jaro, kiu komenciĝos en julio 1957, jam estas farataj en Florida (Usono). Planojn anoncis ankaŭ Sove-

tunio. Informoj ricevotaj pere de tiuj „altĉielaj laboratorioj” dum la venonta jaro verŝajne ebligos konstatojn pri la kondiĉoj en kiuj la homoj povos „surteriĝi” al spaca stacio, kiu troviĝas iajn 300, 500 aŭ eĉ 12,000 mejlojn super la tersurfaco.

Estas grave, ke ni sciu, kiajn efikojn havos sur la homan organismo suna radiado ĉe grandaj altecoj, kosmaj radioj kaj radioaktivaj kosmaj polvoj. Estas grave scii ankaŭ, kiel niaj korpoj reagos en ĉirkaŭaĵo, kie mankas oksigeno kaj pli-malpli ne ekzistas la gravito. Informojn pri tiuj kaj aliaj temoj registros mezuriloj portotaj de la artefaritaj satelitoj. Kaj sciencistoj, kiuj studos tiujn informojn, povos sciigi al ni, kiel la homo fiziologie reagos al tiuj novaj ĉirkaŭaĵoj, kaj kiuj apartaj antaŭgardaĵoj estos bezonataj por lin protekti.

Tiaj eksperimentoj eble kondukos poste al la granda aventuro de interplaneda vojaĝado, kiu estis la temo de multa teoria diskutado ĉe la Roma Kongreso. Inter la parolantoj estis D-ro Eugen Sänger, direktoro de la Astronaŭtika Instituto en Stuttgart, kiu prezentis planon por motoro funkciigota de fotonoj (lumeroj), s-ro Jean Barré el Francujo, kiu faris studaĵojn pri atoma motoro, kaj s-ro N.V. Petersen, kies esplorado en Usono ĉefe direktiĝis al planoj pri spacveturilo por la vojaĝo de la tero ĝis la luno. Alian veturilon de tiu speco studas rusaj sciencistoj, kaj Profesoro Gleb Ĉebotarev, de la Soveta Scienca Akademio, anoncis lastatempe dum dissendo el Moskvo, ke la planata spacoŝipo povos porti ŝarĝon 200-funtan kaj estos bazita sur nova metodo de interplaneda navigado, kiu utiligos la graviton de la tero, la suno kaj la lunon.

Hodiaŭ interplaneda vojaĝado troviĝas ankoraŭ en la regno de scienca fikcio kaj neniu povas antaŭdiri, kiam realiĝos la revo. Malantaŭ ni troviĝas jaroj da teknika kaj scienca esplorado. Antaŭ ni troviĝas la luno, la planedoj kaj la ekstera spaco. Kiam la homoj sukcesos liberiĝi de la gravita forto kaj komencos esplori la universon? Tio estas demando, al kiu povas respondi nur la scienco.

(UNESKO)

SCIENCAJ NOTOJ

Spacfikcio kaj sciencaj faktoj

DE LUCIEN NÉRET

NOVA PROGRESO DE UEA

24.527 membroj en 1956!

La Centra Oficejo de la Asocio ĵus komunikis, ke laŭ la stato je la 31-a de decembro UEA konsistis en 1956 el 23.130 membroj de ĉiuj kategorioj kaj ke tiu nombro ankoraŭ iom altiĝos, ĉar oni atendas kelkajn pliajn pagojn. (Efektive: je 25-1 '57 estis registritaj **24527** membroj 1956, Rim. Dir. C.O.). Tiu ĝojiga informo signifas, ke UEA superis sian propran rekordon de la jaro 1955, kiam ĝi havis 21.762 membrojn – nombron, kiun ĝi en sia tuta historio neniam antaŭe estis atinginta.

La plua nombra kresko de la membraro estas la plej kuraĝiga rekono de la Esperantistaro al la streĉaj klopodoj de la Komitato kaj Estraro konduki la Movadon laŭplane, paŝon post paŝo, sed des pli firme kaj senkompromise, al novaj venkoj. Dankon al la gvidantoj de la landaj asocioj kaj lokaj societoj, al niaj ĉefdelegitoj, perantoj kaj delegitoj, al la redaktoroj de la Esperantaj gazetoj kaj revuoj, al la Direktorino kaj geoficistoj aŭ helpantoj de la Centra Oficejo, al ĉiuj membroj, kiuj per sia laboro aŭ eĉ nur apogo en kiu ajn formo kontribuis al la nova progreso!

En tiu ĉi jaro ni festas la 70-an datrevenon de unu el la plej gravaj momentoj en la kultura evoluo de la homaro: la publikigo de la genia verko de Zamenhof. Plej digne kaj plej efike ni esprimos nian dankon al la memoro de la nobla aŭtoro de la Internacia Lingvo, pro la donaco kiun li faris al la mondo, se ni ĉiurilate intensigos kaj ampleksigos niajn aktivecojn. UEA jam realigas tutan aron da ili kaj planas pliajn. Multaj landaj asocioj kaj lokaj societoj jam agas same, dum la aliaj baldaŭ sekvos. Estas necese, ke ankaŭ ĉiu unuopa esperantisto faru sian eblon. Kaj la minimumo farenda estas:

Tuj pagi la kotizon por 1957 en kiel eble plej alta kategorio (MS aŭ MA) kaj varbi novajn individuajn membrojn inter la anoj de la loka societo, inter la gekonatoj, gekursanoj, ĉie:

Havigi al la Asocio kiel eble plej multajn apogantojn.

Per komunaj fortoj ni atingu en 1957, la Jubilea Jaro de Esperanto, pluan fortikiĝon de la Asocio!

UEA laboras por la disvastigo, praktika utiliĝo kaj ĉiam pli granda prestiĝo de Esperanto, sed oni bone konsciis, ke ju pli forta ĝi estas, des pli potenca estas ĝia voĉo. Tial subteni UEA signifas kontribui al plua progresado de la Internacia Lingvo.

La sukcesoj de la lastaj jaroj, speciale la plej nova, firmigu la fidon de la fidelaj, fortikigu la kuraĝajn, kuraĝigu la ŝanceliĝantajn kaj revenigu en la vicojn de la organizita Movado ĉiujn, kiuj pro kiu ajn kaŭzo malproksimiĝis aŭ tute forlasis ĝin eble eĉ antaŭ multaj jaroj.

UEA plenumos sian devon ankaŭ en tiu ĉi jaro. Plenumu ankaŭ vi la vian!

ANTAŬEN AL 30.000 MEMBROJ!

ANTAŬEN AL 100.000 APOGANTOJ!

Prof. D-ro Ivo Lapenna,
Generala Sekretario

Prof. D-ro Giorgio Canuto,
Prezidanto

Torino - Londono, la 7-an de januaro 1957

Bonvolu turni.

PARTOPRENU LA KAMPANJON DE LA JARO I

Kiel estis detale klarigite en nia januara numero 1957, tiu kampanjo koncernas grandskalan varbadon de *Apogantoj*, nome, de homoj, kiuj, kvankam mem ne esperantistoj, tamen ne rilatas malsimpatie al la afero de Esperanto kaj kiuj certe estas pretaj subteni ĝin unufoje en la vivo per sumo de 5.— n.gld. aŭ proksimuma egalvaloro. Tiajn homojn ĉiu esperantisto konas en sia proksimeco. TIAL:

Skribu tuj pŝtkarton

al nia oficejo, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando, por mendi libreton kun atestilo de Apogantoj!

Ni senprokraste sendos ĝin al vi per registrita letero kaj ni debetos vian konton per ĝia valoro, sed *vi pagos neniom*.

Ricevinte ĝin vi bonvolu atente legi la instrukciojn sur la kovrilaj paĝoj de la libreto. Kiam vi varbas Apoganton, vi plenigu kaj detranĉu la dekstran parton de la atestilo kaj vi donu ĝin kiel kvitancon al la varbito, kiu pagos al vi unufoje en la vivo kotizon de Apoganto sumantan en la diverslandaj valutoj: 40 arg. pesos; 10 angl. ŝil.; 40 aŭstraj ŝil.; 70 belgaj fr.; 60 braz. kruz.; 10 danaj kr.; 300 finn. mk.; 500 fr. fr.; 6 germ. mk.; 50 hisp. pes.; 25 isl. kr.; 1000 it. lir.; 2 izr. p.; 500 jap. jen.; 500 jug. din.; 2 kan. dol.; 5 n. gld.; 10 norv. kr.; 50 port. esk.; 10 sv. kr.; 5 sv. fr.; 5 ur. pes.; 2 us. dol.; 5 ven. bol.

La maldekstran parton vi plenigu, sed ĝin vi lasu en la libreto. Post varbado de 10 Apogantoj, restos do al vi la kovrilo de la libreto enhavanta 10 maldekstrajn slipetojn, dum vi estos enkasiginta dekfoje la suprenomitan kotizon de Apoganto. Tiun sumon vi bonvolu tuj pagi al U.E.A. pere de via landa asocio aŭ ĉefdelegito, per ĉeko aŭ poŝtmandato aŭ iel ajn, laŭ la eblecoj de via lando, tiel ke ni povos krediti vian konton per la koncerna sumo.

Samtempe vi resendu la kovrilon kun maldekstraj slipetoj al nia oficejo.

Estas klare, ke vi mem nenion riskas. Vi nur estu sindona varbanto. Se malgraŭ ĉiuj klopodoj vi ne sukcesos varbi dek Apogantojn, sed ekz. nur sep, vi rajtos resendi la libreton ankaŭ kun la tri restintaj atestiloj kaj 7 kotizoj, sed principe ĉiu klopodu disvendi ĉiujn dek atestilojn.

Resendinte dek malplenajn libretojn, nome, varbinte 100 *Apogantojn*, vi ricevos librodonacon en la valoro de 50.— n. gld. laŭ via elekto el la librolisto de U.E.A.!

Oni ofte diras ke la esperantistoj ne estas riĉaj homoj. Tial ni ne petas de vi monon sur tiu ĉi loko. Oni ofte diras ke la esperantistoj estas sindonemaj homoj. Tial ni petas de vi nun tie ĉi nur sindonon!

M. H. VERMAAS,
Dir. C.O.

Post tralego donu aŭ sendu tiun ĉi flugfolion al iu el viaj gekonatoj, kiu ankoraŭ ne estas individua membro de UEA.

La sekretarioj de la Esperanto-grupoj estas petataj informi pri la enhavo, aŭ tralegi la tutan tekston, en unu el la proksimaj kunvenoj de la grupo. Pliaj ekzempleroj senpage haveblaj ĉe nia oficejo en Rotterdam.

Bonvolu turni

CED

Centro de Esploro
kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo.
Telefona ARNold 90-81

ESPERANTO-STRATOJ EN LA MONDO

Laŭ la enketo, kiun faris por CED ĝia kunlaboranto G. C. Fighiera en 1956, en la sekvantaj urboj troviĝas stratoj aŭ placoj kun la nomo „Zamenhof“ aŭ „Esperanto“:

Argentino: Venado Tuerte, General Alvare.

Aŭstrujo: Graz, Klagenfurt, Radstaedter-Tauern.

Belgujo: Antwerpen.

Brazilo: Puerto Alegre (Esperanto-placo). Puerto Alegre (Zamenhof-strato), Caracao de Jesus.

Ĉeĥoslovakujo: Hradec Kralové, Doksy, Bohumin.

Francujo: Alès, Amiens, Angers, Arras, Benlys-sur-mer, Boulogne-sur-mer, Cagnes-sur-mer, Cannes, Commentry, Hagondange, Haumont, Houilles, Hyères, Issy-les-Moulineaux, Liévin, Limoges, Marly-les-Valenciennes, Marseille, Montbéliard, Mulhouse, Perpignan, Romans-sur-Isère, Rosendaël, Dunkerque, Saint-Raphaël, Sotteville-les-Rouen, Strasbourg-Bisheim, Thiers, Villeneuve-Saint-Georges, Viroflay, Rivesaltes, Rueil-Malmaison.

Germanujo: Dresden, Düsseldorf, Bad Neuenahr, München.

Hispanujo: Valencia, Palma de Mallorca.

Italujo: Milano, Bologna.

Izraelo: Nova Bjalistok.

Jugoslavio: Zagreb.

Nederlando: Amsterdam, Arnhem, Den Haag, Rotterdam.

Pollando: Warszawa, Lodz, Bjalystok, Krakow, Sród-borów, Zamosć, Jelenia Góra (Zamenhof-strato kaj Grabowski-strato), Wielun, Czestochowa, Kutno, Szopienice.

Svedujo: Göteborg.

Entute: 70 stratoj aŭ placoj en 68 urboj.

Se ankoraŭ en iu urbo troviĝas placo aŭ strato kun la nomo „Esperanto“ aŭ „Zamenhof“, la grupo aŭ delegito en tiu urbo bonvolu informi pri tio s-ron G. C. Fighiera, KKS, 32, Cours Estienne d'Orves, Marseille I, Francujo.

1.428 RADIO-ELSENDOJ EN 1956

Laŭ la statistiko, kiun ĵus ellaboris s-ro G. Larglantier, en la jaro 1956 20 radio-stacioj el 12 landoj (Aŭstrujo, Brazilo, Francujo, Guatemalo, Hispanujo, Italujo, Jugoslavio, Nederlando, Portugalujo, Svedujo, Svislando kaj Urugvajo) elsendis entute 1.428 programojn en Esperanto. La daŭro de ĉiuj ĉi programoj estis 346 horoj. En 1955 estis 1.168 elsendoj, en 1954 1.012 elsendoj, en 1953 844 kaj en 1952 740 radio-elsendoj. Kiel oni vidas, la Esperantlingvaj radio-elsendoj estas preskaŭ duobligitaj en nuraj 4 jaroj. Ankaŭ tiurilate estas farita konsiderinda progreso. Espereble en la jaro 1957 la nombro de radio-elsendoj estos ankoraŭ pli granda.

En la sekvanta bulteno de CED ni publikigos informojn pri ĉiuj Esperantlingvaj radio-elsendoj inter 1945 kaj 1956.

DONACOJ POR CED

	£	s	p
Stato je la 3-a de oktobro 1956	117-	9-	11
D-ro Zeballos Morales, Urugvajo		9-	4
S-ro Ponti, Nederlando		8	
S-ro F. S. Williams, Aŭstralio		1	
S-ro S. A. Klukowski, Usono		1-	15
S-ro John Futran, Usono		14-	4
Stato je la 31-a de decembro 1956	121-	16-	7

Al ĉiuj donacintoj plej koran dankon. Donacojn oni povas sendi al UEA, 7, Eendrachtsweg, Rotterdam, Nederlando; al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, Rue Chabrol, Paris X, Francujo; al ĉefdelegitoj de UEA aŭ CED rekte je la nomo kaj adreso de ĝia direktoro, 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Britujo.

KIUJ LANDOJ HELPAS AL LA LABOROJ DE CED ?

CED regule publikigis la nomojn de organizaĵoj kaj unuopuloj, kiuj dum la jaro 1956 finance helpis al ĝiaj laboroj. Jen resumo laŭ la landoj:

Usono	£ 39-16- 4
Svedlando	„ 25- 0- 0
Svislando	„ 12- 2- 8
Britujo	„ 8- 9- 5
Venezuelo	„ 7- 2- 1
Nederlando	„ 6-18- 7
Danlando	„ 6- 1-11
Francujo	„ 5-17- 3
Novzelando	„ 5- 0- 0
Aŭstralio	„ 3- 4- 0
Germanujo	„ 1- 3- 0
Urugvajo	„ 0- 9- 4
Hispanujo	„ 0- 7- 3
Jugoslavio	„ 0- 4- 9
	<hr/>
	121-16- 7

Specialan mencion kaj dankon meritas la Usonaj esperantistoj, kiuj en tiu ĉi jaro — por la unua fojo de post la fondiĝo de CED — kontribuis la plej grandan sumon, fakte pli ol kvaronon de la tuta kolektita financa helpo. Tre gratulindaj estas la Sveda kaj Svisa landaj asocioj, kiuj plej regule, jam dum kelkaj jaroj, helpas per siaj kontribuoj al la laboroj de CED. Same tiel la Novzelanda asocio regule sendas siajn donacojn. El la supra informo oni facile rimarkos, ke el la pliparto de landoj menciitaj, nur tiu aŭ alia unuopulo sendis sian donacon al CED. El multaj aliaj landoj venis neniu kontribuo. Certe la kaŭzo ne troviĝas en la manko de konsidero pri la graveco de tiu institucio, sed verŝajne ĝi estas rezulto de forgesemo. CED ne estas organizaĵo de tiu aŭ alia lando, sed speciala institucio de UEA kaj de tuta Movado, laboranta per sciencaj metodoj por la interesoj de la Internacia Lingvo. Ĉiu Esperanto-Organizaĵo kaj ĉiu unuopa esperantisto, kiu deziras pliajn progresojn de la Internacia Lingvo, memoru pri tiu fakto kaj konsci, ke sen minimumaj financaj rimedoj CED ne povas labori kaj ke ju pli grandaj estos la materiaj fontoj je dispono de CED, des pli efike ĝi povos plenumi siajn taskojn. Ĉiu landa asocio, ĉiu Esperanto-societo kaj unuopa esperantisto faru kiel eble plej baldaŭ sian eblon, por ke CED en la sekvanta jaro ricevu konsiderinde pli altan financon helpon, kiu ebligas al ĝi fini ĝustatempe ĉiujn planitajn laborojn.

Akceptitaj Statutsanĝoj

Per ĝenerala voĉdonado finiĝinta la 15-an de decembro 1956, la landaj asocioj kaj individuaj membroj akceptis per grandega plimulto la jenajn ŝanĝojn en la statutoj proponitajn de la komitato en Kopenhago:

Par. 1. Aldoni al tiu artikolo jenan alineon:

„La Universala Esperanto-Asocio estas fondita por la daŭro de periodo de 29 jaroj, kalkulita de la 28-a de aprilo 1947 kaj sekve finiĝanta je la 28-a de aprilo 1976“.

Klarigo: por akiri juran personecon de organizaĵoj en Nederlando oni fiksis maksimuman periodon de 30 jaroj. Tamen en la Statuto oni nomas 29 jarojn, por ke oni havu unu jaron por pridiskuti, ĉu daŭrigo por denove 29 jaroj necesas.

Par. 6. Anstataŭi per jena teksto:

„La Sidejo. La ĉefsidejo de la Asocio estas en Nederlando. La Sidejo de la Serva Centro estas en Svis-

lando. La Komitato povas per 2/3 de la voĉoj de ĉiuj komitatoj ŝanĝi la landojn kaj lokojn de la ĉefsidejo kaj de la Serva Centro. La Estraro rajtas funkcii aliajn oficejojn laŭbezone".

Klarigo: tiu ĉi teksto adaptas la Statuton al la realaj cirkonstancoj.

Par. 10. Aldoni:

„(ĉ) membroj de la Honora Patrona Komitato”.

Klarigo: La H.P.K. estas proponita de la Komitato kiel prestiĝa organo, kies tasko estas helpi al altigo ĝis plej alta grado de la reputacio de UEA. La Regularo pri la H.P.K., kiun unuanime akceptis la Komitato, antaŭvidas, ke nur eminentaj sciencistoj, antaŭ ĉio lingvistoj, povos esti elektitaj kiel membroj de la H.P.K.

Par. 13. Post la lasta vorto „asocioj” de la unua alineo aldoni:

„, sed la Komitato rajtas akcepti plurajn”.

Klarigo: Ĉiam UEA havis la eblecon akcepti el unu regno plurajn landajn asociojn. La proponita aldono nur pli klare fiksas tiun regulon, kiu ankaŭ ĝis nun estis aplikata absolute en la sama senco.

Par. 14. En la dua linio forstrecki:

„samaj kondiĉoj kiel la landaj asocioj” kaj anstataŭi per:

„kondiĉoj fiksitaj en la Generala Regularo”.

Klarigo: por eviti duoblan kalkuladon de membrŭj de U.E.A. kiuj estas ankaŭ membroj de fakaj asocioj, estas necese membriĝi la fakajn asociojn laŭ kondiĉoj nedependaj de ilia membronombro.

Par. 20. En la kvina linio post la vorto „organizajoj” meti la vortojn „aŭ Komitatoj de U.E.A.”.

Klarigo: ĉar la Estraro estas elektita de la Komitato kaj respondeca al ĝi, la Estraro ne povas eksigi el la asocio iun Komitatanon, sed nur la Komitato, kiel la supera organo de U.E.A. povas tion fari.

Par. 21. En la dua alineo forigi la vorton „kaj”, meti anstataŭe komon kaj aldoni post „fakdelegitoj” la vortojn „aŭ aliaj delegitoj”.

Klarigo: pro starigo de Junular-sekcio, decidita en Kopenhago, estu malfermita la ebleco estonte krei kategorion de Junulardelegitoj, kiuj tamen ne estos fakdelegitoj.

Par. 25 (a) En la unua linio aldoni post „aliĝinta” la vorton „landa”.

Post la unua alineo aldoni novan alineon kun jena teksto:

„ĉiu aliĝinta faka asocio (par. 14) elektas unu komitatanon A. Se estas pli ol 5 aliĝintaj fakaj asocioj, ili elektas inter si 5 komitatojn”.

La antaŭa dua alineo fariĝas tria alineo.

Post tio aldoni novan alineon kun jena teksto:

„Aliĝinta landa asocio havanta malpli ol 150 membrojn, rajtas elekti unu observanton al la Komitato. La observanto ricevas ĉiujn dokumentojn de la Komitatoj kaj rajtas ĉeesti la Komitatkunsidojn, sed ne havas voĉdonrajton”.

En la fino de par. 25 aldoni jenan frazon:

„Komitato devas esti membro-abonanto de U.E.A.”

Par. 27. Ŝanĝi la tekston de la dua alineo jene:

„rajtas nomi Honoran Prezidanton, Honorajn Membrojn kaj Membrojn de la Honora Patrona Komitato”.

Par. 29. En la kvara linio ŝanĝi la vorton „administranton” al „direktoron”.

Klarigo: siatempe, post transiro de la oficejo al Britujo, la ĝis tiam ekzistinta titolo „direktoro” estis ŝanĝita pro la cirkonstancoj kaj kutimoj en Britujo. Ree sur la kontinento, multe pli taŭgas la titolo „direktoro” ol „administranto”, precipe pro kaŭzoj de traduko al nacia lingvo, dum la signifo de la vorto direktoro pli bone respondas al la fakta stato. Plue, la ankaŭ proponita titolo „administrata sekretario” povas kaŭzi konfuzon kun la titolo „ĝenerala sekretario”.

Par. 36. Same kiel en par. 29. Krome, forigi en la dua linio la vortojn „kiu respondecas pri la taskoj de „secretary” laŭ la brita leĝaro”.

Par. 40. Anstataŭi la tekston per:

„ĉiujare la librotenado kaj la agado de la oficejo devas esti ekzamenataj de minimume 2 komitatoj, kiuj raportas al la Estraro kaj la Komitato. La cernaj Komitatoj estas nomataj de la Komitato”.

Par. 43. En la kvara alineo, dua linio, post la vorto „Statuton” meti la vortojn „, kun escepto de la par. 6 rilate la sidejojn.”.

Aldoni en la fino novan alineon kun jena teksto: ŝanĝo en la Statuto ekvalidas unu monaton post akiro de la aprobo fare de la nederlanda instanco pri jura personeco”.

Par. 45 Anstataŭi per jena nova teksto:

„en okazo de dissolvo, kun observo de par. 1702 de la nederlanda Civila Kodo, la Komitato nomas komisionon, kiu

1. likvidas la kurantajn aferojn de la asocio;
2. indikas la rimedojn por kovri eventualan deficiton aŭ donacas la restantajn havaĵojn al alia Esperanto-organizajo, kiun indikas la decido pri dissolvigo”.

Klarigo: par. 1702 indikas ke okaze de dissolvo de organizajoj havantaj juran personecon, ĉiu membro persone respondecas pri la ŝuldoj ktp. Per la menciita teksto oni evitas tion.

En kunligo kun tiuj ĉi statutŝanĝoj estas akceptitaj ankaŭ jenaj ŝanĝoj en la Generala Regularo:

Par. 2. Unua alineo, dua linio, post la vorto „Esperantista” meti la vorton „landa”.

En la sama frazo ŝanĝi la lastan ciferon „150” en „25”.

En la dua alineo post la vorto „Esperantistaj” meti la vorton „landaj”.

Aldoni novan trian alineon kun jena teksto:

„la aliĝintaj fakaj asocioj (par. 14 de la Statuto) pagas jaran kotizon de 50 n.gld. senkonsidere al la membro-nombro”.

La antaŭa tria alineo fariĝas kvara alineo.

En tiu alineo ŝanĝi la tekston de (V) DM-Dumviva Membro en: „tiu pagas 20-oblan M.A.-kotizon por kovri la kotizon kiel M.A. dum la vivo.

La kotizoj por la individuaj membroj estas fiksitaj de la Komitato”.

Par. 4. La duan frazon ŝanĝi en: „delegito devas esti almenaŭ M.A. de U.E.A. (ĉe geedzoj oni permesas esceptojn”.

Plue, estas akceptite ke la sumoj en la statuto kaj ĉiuj Regularoj estu ŝanĝitaj al la nederlanda valuto kaj ke la Estraro estos libera akcepti sensignifajn ŝanĝetojn eventuale postulatajn de la nederlandaj aŭtoritatoj, por akiri la juran personecon.

La ĝisnun validaj tekstoj de Statuto kaj Generala Regularo troviĝas en Jarlibro 1955, Dua Parto.

M. H. Vermaas

Direktorino de la Centra Oficejo

La usonaj esperantistoj elektas la gustan vojon

La klubo de Washington sendis solidarecesprimon al U.E.A. kaj samtempe rekte aligis al la Asocio 14 novajn membrojn. La klubo de Ĉikago informis, kun subskriboj de ĉiuj membroj, ke ĝi „bedaŭras la kalumniajn atakojn presitajn en Amerika Esperantisto kontraŭ la Estraro kaj membroj de U.E.A. kaj ne akordas kun (kaj ankaŭ voĉdonis kontraŭ) la rezolucioj de la 1956 E.A.N.A.-kongreso”. La membroj de tiu klubo esprimis la deziron resti individuaj membroj de U.E.A. Krom la leteroj de tiuj du gravaj kluboj atingis U.E.A. multaj leteroj de unuopuloj en Usono, kiuj esprimis sin simile.

Subtenu la Japanan Kampanjon por Instaligi Esperanto-kurson en Radio-Programo

La Kansai (Kobe-Osaka-Kioto)-distrikta Plenumkomitato de la Japana Jubilea Kongreso 1956 kolektas personajn subskribojn por petskribi NHK (Japana Brodkasta Asocio), ke ĝi fondu la konstantan Radio-Kurson de Esperanto.

NHK dissendas ĉiutage tra la jaro la regulan kurson de la lingvoj: angla, franca, germana, hispana kaj ĉina. Nun, kiam la Rus-Japana Interkonsento de Diplomaciaj Rilatoj estas subskribita, oni ne bezonas dozon de vizio por profeti, ke NHK projektos baldaŭ enprogramigi la rusan lingvon.

La japana lernemo de fremdaj naciaj lingvoj jam estas tradicia. Japanoj lernis antaŭ 13 jarcentoj la ĉinan kaj antaŭ 2 j.c. la holandan por enkonduki la fremdajn kulturojn. Ambaŭ lingvojn ili lernis kaj studis, tamen ne en la senco de moderna lingva studo. Ili lernis, ekzemple, la ĉinan nur por kompreni ĝin laŭsence kaj skribi. Ili legis ĝin propramane laŭ la reguloj de la japanlingva sintakso kaj prononco. Estis pli-malpli same ankaŭ pri la holanda. La unua okcidenta libro, kiun la japanoj iam tradukis, estis *Tafel Anatomia*, verko de la holanda doktoro *Kulmus*. Kelkaj junuloj kunsidadis por ĝin traduki. Sed ili „nur gapadis al ĝi sencie kion fari, kvazaŭ veturi oceanon per ŝipo sen remilo kaj direktilo”. Ofte la „tutaj longaj printempaj tagoj ne estis sufiĉe longaj por deĉifri unu-du kolorojn da frazo”.

Hodiaŭ, la vojo al ĉiu fremda lingvo jam estas glatigita teknike. Dum la Pacifika Milito, kiam Japanujo ankoraŭ estis la konkeranto sur la sudmaraj insuloj kaj duoninsuloj, mi memoras, kiom multaj novaj aboco-libroj germana, itala, malaja, java, birma, tagaloga (nord-filipina), siama, anama (vjetnama) k.a. inundis la standojn de librovendejoj! Kaj kiom malkare, senpage preskaŭ, oni povis aĉeti la anglalingvajn librojn kaj vortarojn stapligitajn en polvo ĉe malnovlibrejoj! Sed per unu tago, en kiu MacArthur surlandiĝis sur nia tero, la tajdo renversiĝis. Ĝi forportis englute preskaŭ ĉiujn librojn de la sudmaraj lingvoj — kien oni ne scias. Dek unu jaroj pasis. Kaj nun estas la vico de la rusa, kiu furoros paralele kun la vestmoda „magnet-linio” de Kristian Dior. Japanoj ankoraŭ lernos kiun ajn lingvon de la mondo, se ĝi iĝus laŭmoda. Tio ne estas riproĉinda. Mi nur timas, ke N-ro 2 Programo de NHK, kiu estas por la popol-edukado kaj -klerigado, baldaŭ fariĝus plena de lingvoj. Cetere, la fremdaj lingvoj por la plejparto de la popolamaso estas kvazaŭ muziko por la hundo Viktor-gramofona. Ni tamen lasu tiujn aŭskulti, kiuj havas orelon.

Kompreneble, mi ne asertas, ke la lingvolernado jam ne estas necesa por la japanoj. Ĝi estas ĉiam ankoraŭ necesa, kaj mi scias, ke troviĝas granda rombo da japanoj, ĉu profesiuloj, ĉu

diletantoj, kiuj lernas, studas kaj uzas fremdan lingvon multe pli serioze, ol la supre-aluditaj frivolaĵoj. Ili estas la studentoj, instruistoj, interpretistoj, tradukistoj, ĵurnalistoj, literaturistoj, lingvistoj, ktp. Sed la fakto, kiun mi volas substreki ĉi tie estas, ke kvankam ili eble estas la portantoj de la moderna kulturo, tamen ili jam ne estas la pioniroj en la senco, laŭ kiu la vorto iam estis uzata en nia lando.

Antaŭ duonjarcento Esperanto semiĝis en nia lando. Hodiaŭ kelkaj miloj da celkonsciaj Esperantistoj laboras kiel „bravuloj” en la moderna senco de la vorto. Se ne ekzistas la lingva malfacileco por ili, ili tamen devas konstante disfali la fortikaĵojn de antaŭjuĝo — antaŭjuĝo blinkenberga.

Unu ĵurnalista, kiu estas poligloto kaj radiofamulo en la retaro de NHK, foje-foje, tute senĝene misfamigas, ke Esperanto estas speco de latinido artefarita; ke ĝi ne estas tiel facila, kiel la Esperantistoj kredigas; ke nenie li renkontis eĉ unu Esperantiston dum sia mult-jara restado en multaj partoj de Eŭropo; ke estas multe pli utile lerni iun ajn fremdan lingvon ol Esperanto, ktp. Estas bedaŭrinde, ke neniu japana Esperantisto estas privilegiita doni sian liberan voĉon ĉe la mikrofono kiel li.

Ni do bezonas kolektive agadi energie kaj sisteme, tiom pli, ĉar se temas pri la popularigo de Esperanto en la tempo de amaskomunikado, neniu dubas, ke la radio estas la plej potenca disvastigilo. Ni devas alpaŝi la plej altan instancon de la japana radio, por ke Esperanto trovi sian lokon en ĝia programo. Jen kial la nuna kampanjo de la Kansai-Plenumkomitato por instaligi la konstantan kurson de Esperanto en la programo de NHK estas nepre subteninda. Ĝi estas iniciatita eĉ tro malfrue.

Mi iam publikigis japanlingvan artikolon, en kiu mi alvokis la japanajn Esperantistojn, ke ili persone skribu al la radio-asocio pri la fondigo de Esperanto-kurso. Hodiaŭ mi min turnas al la tut-

mondaj Esperantistoj kun jena peto: Bonvolu skribi individue aŭ kolektive al NHK, postulante (taktoplene!) la Esperantan disaŭdigon de novaĵoj, informoj kaj muzikoj el Japanujo. Mi ne dubas, ke en Japanujo oni pli aŭskultos la voĉon de okcidentanoj, ol tiun de sampatrujanoj. Kaj tio grande helpos turni la tajdon favore al la kampanjo de la Kansai-Plenumkomitato. Anticipan dankon!

(Adreso: NHK, 2 Uĉisaiŭai-ĉo, Ĉijodaku, Tokio, Japanujo.)

Teruo Mikami

Vivo de S. A. E.

Meze en niajn traktadojn kun Moskva Esp. centro pri sendo de plej necesaj libroj kaj de la gazeto al Soveto eksplodis la krizo de Suez kaj de Mez-Oriento kun siaj nekalkuleblaj sekvoj. La alfluo de leteroj el Sovetio al nia Sidejo ĉesis abrupte.

La malĝojigaj eventoj en Hungario instigis ankaŭ la SAT-estraron voki en la oficiala organo („Sennaciulo” de decembro) pri monhelpo por la speciala celo mildigi la sorton de trafitaj membroj aŭ, ĝenerale, esperantistoj. Jam antaŭ la apero de tiu alvoko kelkaj sumoj spontane atingis nin.

La frat-organizo Asocio de Laboristaj Esperantistoj en Nederlando publikigis en la novembra n-ro de sia organo „Laborista Esperantisto” deklaron de sia estraro, kondamnanta severe la agadon de sovetiaj trupoj en Hungario kaj esprimanta sian kunsenton kun la viktimoj, same kun tiuj de la Egipta milito.

La redaktanto de SAT-Infomilo por la horzonoj 5-12 (t.e. ĉefe Azio), kiu aperas en Tokio kvarfoje jare, alvokis en „Sennaciulo” pri subteno de eŭrop-amerikaj kamaradoj per abono (4 resp. kuponoj).

En Roterdamo Organiza Komitato preparas aktive la 30-an Kongreson de S.A.T. Ministroprezidanto Drees certigis sian partoprenon kaj akceptis la honorprezidon.



Okazis giganta Esperanto-ekspozicio dum la XVIIa Hispana Kongreso de Esperanto en Barcelona, 1956, kie, krom infandeseĝnaĵoj el 25 landoj, oni eksponis tre kompletan kolekton de esperantaj libroj, revuoj, afiŝoj, k.s. Troviĝis japana stando tiel bone provizita, ke ĝi kaŭzis sensacion, precipe ĉe la ĵurnalistoj kaj instruaj medioj. Tial oni aranĝis japanan ekspozicion en la apuda urbo Sabadell, kiu simile favore impresis. Nia foto montras parton de tiu ekspozicio.

ESPERANTO KAJ ROTARY- KLUBOJ

Oportuna iniciato

En sia numero de oktobro 1956, la gazeto „Le Rotary Français” publikigis, subskribitan de Marcel Genermont en Moulins, bonegan artikolon pri Esperanto. En ĉi-tiu artikolo, la aŭtoro elmontras al la Rotary-anoj ke se nun universala lingvo estas nepre necesa inter la homoj, ĝi estas ankoraŭ pli necesa inter la Rotary-anoj, kies rilatoj estas esence internaciaj. Facile li klarigas ke nur neŭtrala lingvo taŭgas tiucele, kaj, per praktika leciono, elpruas ke oni povas elekti nur Esperanton, kies internacia ideo, difinita de Zamenhof, tute korespondas al la Rotary-aj celoj.

Tiu artikolo, kaj la vigla parolado kiun li faris antaŭ la anoj de Rotary-Klubo en Moulins kaj Vichy, vekis ĉe la Rotary-anoj ian intereson, se oni juĝas per la multnombraj leteroj, kiujn li ricevis.

Tial estis decidite ke la Rotary-Klubo de Moulins kaj Vichy — kies ekzemplo, se la eksperimento sukcesos, povos esti sekvata de aliaj kluboj — povos organizi per Esperanto, kun eksterlandaj malproksimaj Rotary-Klubo, la sistemon „klub-kontakto”, kiu jam ekzistas inter kluboj de najbaraj landoj. Per tiu sistemo povos esti traktataj diversaj internaciaj temoj aŭ demandoj, multe pli facile ol ili estis ĝis nun.

Alvoko, do, estas sendata tie-ĉi al ĉiuj Rotary-Klubo el la tuta mondo por organizo de „Esperanto Rotary Klub-kontaktoj”. Ili sin turnu al Marcel Genermont, architecte, Moulins (Allier) France.

Mi aldonas, ke S-ro Genermont estis je la estigo de U.E.A., la unua ĉefdelegito por Francujo. En la jaro 1912, li estis sendita de la gazeto „L'Illustration” — kiu estis tiam, en Francujo, la plej grava ĉiusemajna ilustrita gazeto — en Polujon, por raportoti pri Universala Kongreso de Krakovo.

D. CHAGNOUX
Honora Membro de U.E.A.

La Ĉarto de la Nova Tero

Ni sugestas, ke se ni ne juste traktas la teron ni ne povas vivi korpe; se ni ne juste traktas niajn proksimumojn ni ne povas vivi socie; kaj se ni ne traktas la „superan memon” juste ni ne povas vivi plene kiel individuoj.

Ni kredas, ke devas disvolviĝi pli ampleksa kompreno pri la vera interrilato inter ĉiuj vivoformoj, kun la celo atingi naturan ekvilibron inter mineraloj, vegetaĵoj, bestoj kaj homoj, ĉar la homo dependas ĉefe de la teraj vegetaĵoj por sin nutri kaj vesti. Por akiri nutraĵon, vestaĵon kaj ŝirmon sur ĉi tiu planedo, ni devas varti la teron kaj, aparte, ne malhelpi senmotive la naturan akvocirkuladon, ĉar tia malhelpo jam kaŭzis grandan grundoperdon de sur la tuta terglobo; kaj ni devas pro la justeco redoni al la

4 Poemoj de Baldur Ragnarsson

Perdita poeto

El lia seĝo blukvadrato
de la ĉiel' videblas nur,
de domoj baras pluan vidon
kaj de l' ĝardeno griza mur'.

Lin tenas al la seĝ' malforto
pro maljunec' kaj peza sort',
li sidas sola tutan tagon
kaj sopiradas al la mort'.

Li pensas pri perdita vivo
kaj senrezult' de l' vana rev',
lin mordas brula sinriproĉo,
ke li forkuris de la dev'.

Lin vokis iam varma voĉo
el la silento de l' anim',
instigis al batalo kontraŭ
dormaĉo daŭra pro kutim'.

„Al vi mi donos pulmoŝorton
necesan por la veka kri',
kaj muzinspiro altdevenan
por korflamiga poezi'.

Vi voku al la dormantaro
mesaĝon altan de la Ver',
ke Dio kreis ilin sole
por interami en sincer'.

Ke ĉiuj vidu la plej simplan
veraĵon de la univers':
Ke ĉiu homo ĉies frato,
kaj regas samo, ne divers'.”

Alvokis tiel varma voĉo
el la profundo de l' silent',
sed tamen lasis preterflustri
li tiun vokon sen atent'.

Li tial sidas forlasite
post la fenestro en ĉagren',
albrilas lin nur ĉielero
anstataŭ tuta la seren'.

tero la forĵetaĵon de ĉio kion ni prenas de la tero.

Ni sugestas, ke akvo devas esti baza konsideraĵo en ĉiuj niaj naciaj kaj tutmondaj forŝtaj programoj; al fluoj kaj riveroj oni devas redoni la naturan movon; inundojn kaj senakvaĵon oni devas forigi. Arbaroj kaj arbarejoj intime rilatas kun biologia, socia kaj spirita bonstato.

La minimuma arbokovro por sekureco estas triono de la tuta tersurfaco. Ĉiu akvokapta regiono devas havi almenaŭ ĉi tiun proporcion de arbokovro, konsistanta el miksitaj specoj, inkluzive de largfoliaj arboj; unuspeca kulturo de kia ajn formo malutilas al la tero.

Nokta penso

Pri vi mi ŝatas pensi post la tago
dum brilas stel',
vi, nekonata frato en la vago
al sama cel'.
Tra spaca mar' la pensoj fluge svarmas
al via Ter',
kaj en mateno mia koro larmas
en senesper'.

Al ni Genez' proklamas

Al ni Genez' proklamas:
la Homon l'Eternulo
laŭ propra bildo kreis
el materia nulo.

Sed Nietzsche disanoncas
ke l'Homo estas Ponto
liganta Superhomon
kun animala fonto.

Cu pravas jen' aŭ jeno
al mi indiferasas,
mi estas via frato,
kun via sang' identas.

Ekruĝas mia vango,
se krudas ago via,
sed fidon mi ne perdas
pri mondo familia,

ĉar legas mi konsole
en la okuloj puraj
de mia filo kara
pri ecoj dinaturaj.

Kristo

De Ter' sendita penta esplorist'
elĝemis plore, repaŝante peze
al la raketo por daŭriga trist'
kaj fulmis for en fajroŝajfo meze.

Nek mankas al li volo nek persist'
por trudi tra l' eterno ajnapreze,
sed estas sen rezult', ĉar ĉiam Krist'
Golgoton jam surpaŝis vivoĉese.

Li plonĝas de planedo al planed',
sed tamen venas tro malfrue ĉiam,
ĉar jame Kriston vipoj sange batis;

jen tag', jen hor', jen nura minutef',
sekundo poste, ties on', eĉ tiam
malfruas tro, Li juse krucumatis.

Ni kredas al la tradicia idealo, ke niaj kampoj devus esti „kampoj en arbaroj”, kiu signiĝas pejzaĝan kultivadon de ĉiu valo kaj ebena, kun arbaroj en altaj lokoj, ŝirmaj zonoj, fruktarbejoj el miksitaj specoj kaj heĝaj arboj ĉie.

La Konsilantaro de la Homoj de la Arboj bonvenigus kiel Fratulojn ĉiujn, kiuj simpatias kun la regeneraj celoj de la Societo, kaj kiuj deziras kunlabori kun ili por restarigi la necesan arbokovron.

Oni petas, ke Esperantistoj traduku la ĉi-supran ĉarton en la proprajn lingvojn (krom la anglan kaj francan lingvojn) kaj afable sendu la tradukaĵojn al: „Trees and Life”, The Firs, West E. d. SOUTHAMPTON, Britujo.



OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 4

Januaro 1957

Pagoj: Bonvolu atenti, ke la sola adreso por la poŝtmandatoj estas: **Groupe Esperantiste — Marseille N-ro 156-15**. Ĉiu erarita adreso povas kaŭzi malfacilaĵojn kaj eĉ perdon de la pago.

Afiŝo: Granda afiŝo pri Marseille, cm. 60 x 100, kun arta bildo de la kongresurbo kaj teksto en Esperanto estas disponebla en limigita kvanto. Prezo: 300 fr.fr. aŭ 8 respondkuponoj por ĉiu ekzemplero. Mendante ĝin oni devas mencii la lokon en kiu ĝi estos publike ekspoziciata.

Novaj perantoj: Reĝa Belga Esperantista Ligo, s-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruxelles;
Flandra Ligo Esperantista, f-ino J. Terrijn, 74, Raapstraat, Gent;
Svisa Esperantista Societo, s-ino Daisy Perrenoud, Faubourg de la Gare 13, Neuchâtel.

Nova Karavano: Centra Dana Esperantista Ligo agnoskis jenan karavano: S-ro S. K. Nielsen, Havepladsvej 129, Fredericia.

Blindula kongreso: La 27-a Internacia Kongreso de la Blindaj Esperantistoj okazos en la kadro de la antaŭ-kongresaj manifestacioj en Lyon de la 30-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1957.

Fakkunvenoj: Anoncis kunsidojn:

42-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Marseille — 3.10 aŭgusto 1957 — Francujo

Adreso: 32, Cours Estienne d'Orves, Marseille, Francujo. Telefonoj: PRado 55-46; FErréol 96-18. Telegrafo: Esperanto.

Banko: James Rosa.
Ĉirkonto: Groupe Esperantiste — Marseille n-ro 156-15.

Akademio de Esperanto, Wassenaar-seweg 11 c, Den Haag, Nederlando.
Kristana Esperantista Ligo Internacia, Druivenstraat 32, Den Haag, Nederlando.

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, Kwaadmechelen, Belgujo.
Universala Ligo, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

Akcepto: Radio-fakuloj kaj esperantistaj oratoroj ĉe Radio-stacioj estos akceptataj en vizito ĉe la Radiaj kaj Televidaj instalajoj de Marseille.

Kongresejo: La Universitato de Marseille, Scienca Fakultato, estos la Kongresejo de la 42-a Universala Kongreso de Esperanto.

Inaŭguro: La Solena Inaŭguro okazos en la klasik-stila Operdomo de Marseille, rimarkinda arkitektura verko de la XVIII jarcento.

Statistiko: (ĝis fino de decembro) Alĝerio 1, Aŭstrujo 11, Brazilo 3, Belgujo 4, Britujo 28, Bulgarujo 5, Ĉeĥoslovakujo 2, Danlando 17, Finnlando 5, Francujo 193, Germanujo 44, Hispanujo 7, Italujo 54, Jugoslavio 23, Japanujo 2, Maroko 4, Meksiko 1, Nederlando 23, Monaklando 3, Norvegujo 3, Novzelando 1, Pollando 3, Portugalujo 5, Saarlando 1, Svisujo 15, Svedujo 19, Usono 3. Entute 480 el 27 landoj (Pasintjare 581 el 24 landoj).

Gian Carlo Fighiera
Konstanta Kongresa Sekretario

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Nardon. Al David, filo de ges-roj R. Nardon, Parizo, naskiĝis frateto **Olivier**, la 17an de oktobro 1956.

NEKROLOGO

Bizot. La 2an de oktobro 1956 mortis en aĝo de 45 jaroj, s-ro Roger **Bizot**, profesoro pri Filozofio, sekretario de la loka esperantista grupo en Carpentras, Francujo.

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

En iom pli ol duonjaro la nova I.P.R. sukcesis krei al si internacian legantaron kaj arigi same internacian stabon da aŭtoroj.

Nia kultura movado estas antaŭen portita de kelkaj internaciaj revuoj, kies nombro kreskas de unu-du jaroj. I.P.R. estas konscia aparteni al tiu kohorto. Ĝi liveras ĉiam interesajn artikolojn en kiel eble plej klara lingvaĵo.

Ĝiaj celoj estas informi, instrui kaj diskuti. Ĝi ne deziras aperigi tro sciencajn esplorojn sed nur artikolojn, kiuj povas interesi la ĝeneralan publikon instruistan. Ĉar multaj el ni estas lernantaj, kaj ĉar ni devas deziri ke ankoraŭ kaj ĉiam pli multaj instruistoj lernu la lingvon, ni dediĉas plurajn paĝojn al la instruado de Esperanto. Tial la gazeto povas kaj devas esti rekomendata ankaŭ al instruistoj, kiuj jus akiris elementajn konojn de Esperanto. Ili efektive trovos lecionojn perfektigajn skribitajn por ili, kune kun materialo destinita ilin helpi en ilia posta esperanto-instruado. Ili krome trovos artikolojn, ne skribitajn por komencantoj, sed kiuj interesos ilin profesie: ĉu tio ne estas la plej favoraj cirkonstancoj por finlerni kaj tuj ekuzi Esperanton?

Unu el la streboj de la esperantomovado estas la enkonduko de la lingvo en la lernejojn. Kiu pli bone ol la instruistaro mem povos efektiviĝi tion? La instruistaro bone organizita kaj posedanta bonan organon kiel **Internacia Pedagogia Revuo** certe atingos bonajn rezultojn.

Sed por tio necesos, ke ankaŭ vi helpu: abonnu mem se vi estas instruisto; instigu al abono vian instruistan amikon.

Memkompreneble, ankaŭ neinstruistoj havos grandan intereson per la legado de la revuo.

Jara Abono: 400 francaj Frankoj (16 steloj, aŭ 12 internaciaj respondkuponoj), pagota en Francujo al:

Edmond BIDOIT, 6 Rue de la Paix, BAUGE (M. et L.).

Poŝt-ĉekkonto: 143-867, NANTES.

aŭ al la landaj perantoj de I.P.R.
aŭ al la landaj perantoj kaj ĉefdelegitoj de U.E.A.

Niaj Konkursoj

Literatura Vetludo N-ro 2

Verku alvokon (prozan aŭ versan) al iu ajn lando aŭ teritorio, kie nia lingvo estas ankoraŭ nemulte konata (Hindujo, Afriko, Ĉinujo, Grenlando, Pacifiko ktp.), rekomendante Esperanton. Poemoj ĝis 16 versoj, prozo ĝis 200 vortoj. La alvokon oni povas adresi ankaŭ al iu gvidanto de la koncerna lando. Konkursantoj povas alpreni pseŭdonimon, se ili preferas (sed aldonu ĝustan nomon kaj adreson). Provoj atingi la redakcion ĝis la 30a de Marto. La plej trafaj ricevos libropremion kun enŝkribo.

JOHN VARTY

Ne forgesu

La Kampanjon de la Jaro:

ĉu vi jam varbis

APOGANTOJN DE UEA?



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V.” sendu al:
Nicola Minnaja,
Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo

KION NI PROPONAS

De post nia 32-a kongreso la Junulara Fako ĉe Bulgara Esperantista Asocio ekagis pli vigle. Nun jam estas organizitaj en junularaj grupoj ĉe la lokaj Esperanto-societoj kaj en apartaj societoj (kiaj estas la lernanta societo en urbo G. Delčov, la societo en urbo Radomir, la vilaĝaj societoj en Leĥovo, Borima ktp.) la plej fervoraj gejunuloj. Kompreneble la ĝis nun ne organizitaj gejunuloj Esperantistoj estas ege pli multnombraj. Jen ĉi momente en la kursoj por komencantoj en Bulgarujo lernas pli ol mil gejunuloj.

Por plibonigi la laboron inter la junularo ni rekomendas al ĉiulanda Esperantista junularo jenon:

Ĉiuj junular-grupoj aŭ societoj estu dense ligitaj kun la koncerna centra estraro kaj inter si por interhelpo kaj unuigita agado en tiu aŭ alia direkto.

La centroj devas regule aperigi en la asociaj organoj instrukciajn materialon por kreo de novaj junulargrupoj kaj por unuigi ties agadon, konsideranta la taskojn donitajn de TEJO, UEA kaj la respektivaj landaj asocioj.

Ĉiuj junularaj Esperanto-grupoj, kluboj kaj societoj estu en konstanta ligo kun la aliaj junularaj organizaĵoj, al kiuj ni proponu nian servon per Esperanto kaj kiujn ni varbu kiel subtenantojn al nia nobla afero.

Ni devas labori por la kreado de junaj Esperanto-funkciuloj, per organizado de someraj junularaj tendaroj kaj per aktiva allogo de la junularo al la societa vivo. Tiucele la junularaj grupoj havu reprezentantojn ankaŭ en la societaj estraroj kaj la junularo aranĝu la programon de la societaj kunvenoj almenaŭ ĉiun kvaran fojon.

Ni devas organizi junularajn kunvenojn al ne-Esperantistoj, antaŭ kiuj ni prelegu pri Esperanto aŭ pri aliaj temoj laŭ materialo akirita per Esperanto (kaj tiun ĉi fakton ni ĉiam substreku).

Ni devas aranĝi la reciprokan gastadon kaj vizitadon de junularaj grupoj kaj ĉefe ni devas nepre certigi nian reprezentadon al la Junulara Festivalo en Moskvo (julio-aŭgusto 1957-a). Kiel ni povos atingi tion? Ni nin proponu al la veturontoj kiel interpretistojn. Krome ni malfermu kursojn por la partoprenantoj en la Festivalo. Kaj antaŭ ĉio ni devas ligi ĉiujn festivalontajn Esperantistojn tuj ek de nun. Ni speciale estus ege ĝojaj, se ni ricevus kiel eble plej baldaŭ (adreso: Sofio, Poŝtkesto 66, Junularo Fako) personajn kaj arajn fotojn, kaj priskribojn kiuj montru al ni la gejunulojn en ilia ĉiutaga vivo, ofica kaj hejma,

ilia ripozo meze de la naturo, ilia amuzado, kaj kompreneble iliajn opiniojn, iliajn revojn pri la Festivalo. La sama afero estas interesa por ni kaj por la ne-Esperantistaj festivalanoj, kaj ni serĉas ligojn kun ili pere de Esperantistoj.

La Festivalo okazas samtempe kun la Universala Kongreso en Marsejlo. Tiurilate ni havas unu rimarkon. Gesamideanoj, la junulara Festivalo estas gravega okazaĵo. Ni devas antaŭ ĉio labori inter la junularo, kaj ĉefe ne-Esperantista. La Universala Kongreso ankaŭ estas grava, sed ĝi estas iom pli intima, nia afero. Tie estos Esperantistoj konvinkitaj. Kontraŭe la Festivalon ĉeestos ĝenerale ne-Esperantistoj, kaj ni devas ilin informi pri nia afero. Do niaj plej spertaj kaj bonaj gesamideanoj devas laŭ ni partopreni la Festivalon kaj ne la Kongreson, ĉar dum la Festivalo ni batalos por nia ideo pli senpere.

Ni ĉiuj aŭ almenaŭ la centra estraro de TEJO devas scii, se ne precize kiuj, kiom da gesamideanoj de ĉiu lando partoprenos la Festivalon en Moskvo.

En Moskvo nin eble atendas venko same tiel grava kiel tiu en Montevideo en 1954-a.

Ni ne preterlasu la eventon!
Petko Arnaudov, prezidanto de Junulara Fako ĉe Bulgara Esperantista Asocio.

LABORTENDARO EN BRITUJO POR ESPERANTISTAJ GEVOLONTULOJ

Ekde Pasko estos ampleksa programo de labortendaroj, kie gejunuloj el multaj landoj laboros kune por farbi aŭ plibonigi infanhejmojn aŭ la apartamentojn de maljunuloj, helpos al vilaĝanoj konstrui halon aŭ al laboristoj konstrui la proprajn domojn ktp. Ankaŭ estos en Tunizio kaj en la Altaj Landoj de Skotlando gravaj projektoj celantaj la progresadon de la kampara vivo.

Oni akceptas iun ajn viron aŭ virinon, kiu estas pli ol 18-jara, bonvolema, laborema kaj preta fari sian eblon por la alproksimiĝo de la popoloj. Oni ricevas nutraĵon sed nenian salajron, kaj kutime la grupoj konsistas en 10-20 gejunuloj.

En Britujo estos tendaro por geesperantistoj. Gesamideanoj, venu multnombro kaj sukcesigu tiun ĉi projekton en ŝlosilpozicio de la tutmonda junularo.

Por informo turnu vin al:
Thomas Woodall, I.V.S.P., 19 Pembroke Villas, London W.11, Britujo.

TURNIRO POR LA GEJUNULOJ

Premioj: 50.000 fr. fr.

En Bourg-la-Reine (Bur-la-Ren), Seine, Francujo, okazos la venontan printempon grava Turniro por la junularo de la Pariza Regiono. Ĝi koncernas ĉiujn gejunulojn loĝantajn en tiu regiono, francajn aŭ nefrancajn, ne pli ol 16-jarajn, kiu ajn estas la dato de kiam ili eklernis Esperanton.

Tiu Turniro konsistos el tri provoj. La unua provo, skriba kaj anonima, celos montri la plej bonajn kandidatojn. Maksimume 50 estos elektataj por trapasi la duan provon. Tiu dua provo, 2-3 semajnojn post la nuna, same estos skriba kaj anonima. Nur la dek plej bonaj kandidatoj rajtos trapasi la trian provon. Tiu tria kaj fina provo estos parola kaj publika. Ĝi okazos dum la Kongreso de la Federacio de la Pariza Regiono en Bourg-la-Reine.

La unua premio ricevos 20.000 fr. fr., la dua 15.000, la tria 10.000, la kvara 5.000. La aliaj ricevos librojn.

Se similaj Turniroj povus esti organizataj en aliaj landoj kaj publikigataj en revuoj kaj journaloj, tio verŝajne incitigus multajn gejunulojn en la mondo eklerni Esperanton.

Sed por atingi tiun rezulton, necese estas fari viglan propagadon, aktivan informadon en ĉiuj mediojn de la junularo.

D-ro G. Maillard


MALLONGAJ INFORMOJ

* V. Popov, respondeculo de Fako Programo en la Soveta Prepara Komitato de la 6-a Tutmonda Festivalo de Junuloj kaj Studentoj, komunikis al la Junulara Fako de Bulgara Esperantista Asocio, ke „konsiderante la multnombrajn dezirojn de la junuloj lernantaj Esperanton, la Internacia Prepara Komitato de la 6-a Tutmonda Festivalo de la Junuloj kaj Studentoj enmetis en la festivalan programon renkonton de la Esperantistoj”.

Car la letero petas de niaj bulgaraj membroj „rekomendojn kaj konsilojn por la efektivigo de tiu renkonto”, kiu deziras doni tiajn rekomendojn kaj konsilojn povas tion fari pere de la Junulara Fako de Bulgara Esperantista Asocio, poŝtkesto 66, Sofio, Bulgarujo.

* Ĝis la 24a de decembro ankaŭ Centra Dana Esperantista Ligo kaj Unuigo Esperantista Franca anoncis la kreon de propraj junularaj sekcioj. Estas tiel 6 landaj asocioj aliĝintaj al UEA, kiuj havas junularan sekcion.

* Okaze de la Zamenhoftago okazis en Rotterdam, en ejo disponigita de UEA, kunveno de junaj nederlandaj Esperantistoj. Oni decidis, restarigi la landan sekcion de TEJO, kiu firme kunlaboru kun LEEN; la kunlaboro jam bone komenciĝis per la partopreno de la ĝenerala sekretariino de LEEN en la organizaj diskutoj de la kunveno.



„Venontan fojon Sidanta Bovo iros al sia vigrvano sen vespermanĝo.”

La 97-a Naskiga Datreveno de Zamenhof

Post nur tri jaroj ni festos la unuan jarcenton de la naskiĝo de Lazaro Ludoviko Zamenhof. Li estis ne nur la iniciatoro de Esperanto, kiel li mem ofte diris; ne nur la aŭtoro de Esperanto, kiel aliaj ĉie skribas; sed la plej grava esperantisto iam vivinta sur la Tero.


En 1956, por memori lian 97-an naskiĝan datrevenon, la esperantistoj en Brazilo faris ion tre gravan kaj tute novan en la Nova Mondo: ili inaŭguris en la koro mem de la ĉefurbo de Brazilo la unuan librejon Esperantan, ĉiam malfermitan al la publiko, kaj funkciantan en propra sidejo de la esperantistoj. Tiun sidejon la esperantistoj aĉetis dum la

konstruado de bela nubskrapanto, antaŭ tri jaroj, kaj jam finpagis ĝin kaj la tutan libroprovizon.

Por havigi al la movado la grandan kapitalon necesan al presejo, sidejo,

librovendejo en grandurbo, la esperantistoj organizis antaŭ 5 jaroj la Kulturen Kooperativon de Esperantistoj, sub energia gvidado de D-ro Braz Cosenza.

I. G. B.



„Kiom da poentoj por tia frapo?”

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por ondlongoj kaj horoj de la dissendoj, vidu la januaran nron p. 13.

Radio Roma. 1-II, Februaro; 5-II, Italujo hidro-minerala; 6-II, Kuriero de Esperanto; 8-II, La Etruska urbo Spina; 12-II, Leterkesto kaj bibliografio; 13-II, Kuriero de Esperanto; 15-II, Giosue Carducci; 19-II, Novajoj el Italujo; 20-II, Kuriero de Esperanto; 22-II, Carlo Goldoni; 26-II, Italujo kaj verkisto John Keats; 27-II, Kuriero de Esperanto, Prelegantoj: S-ro Luigi Minnaja kaj Prof. D-ro Vincenzo Musella. Horsistemoj. Bonvolu ĝustigi la tabelon aperintan sur paĝo 171 de la novembra numero per la jena modifo: Aldonu 2 horojn (anstataŭ 3) al Greenwich tempo por kalkuli horon en Izraelo. Ĉi-tiu ŝanĝo validos ĝis venonta somero.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1956

Stato je la 31-a de decembro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Jugoslavujo	2629	3563	135,53
2.	Italujo	3025	3620	119,67
3.	Hispanujo	1825	2092	114,63
4.	Francujo	5869	6575	112,03
5.	Svislando	1740	1910	109,77
6.	Brazilo	6820	6985	102,42
7.	Svedujo	6893	6895	100,03
8.	Britujo	7608	7351	96,62
9.	Nederlando	5074	4894	96,45
10.	Finnlando	2872	2687	93,56
11.	Germanujo	6986	6515	93,26
12.	Belgujo	2135	1952	91,43
13.	Norvegujo	2318	2113	91,15
14.	Danlando	2765	1910	69,07
15.	Usono	3352	2016	60,14

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Kanado	345	500	144,93
2.	Islando	330	405	122,72
3.	Portugalujo	495	580	117,17

4.	Maroko	937	1061	113,23
5.	Nov-Zelando	854	942	110,30
6.	Japanujo	1182	1210	102,37
7.	Urugvajo	330	325	98,48
8.	Izraelo	300	290	96,66
9.	Aŭstralio	1145	1025	89,52
10.	Sudafriko	305	230	75,41
11.	Aŭstrujo	1485	1000	67,33
12.	Meksikio	250	120	48,—
13.	Irlando	250	55	22,—

Kun granda plezuro ni korege gratulas la samideanojn en Jugoslavio kaj Kanado kaj precipe la tieajn ĉefdelegitojn kaj peranton, pro ilia sukceso. Ili venkis en sia konkurso kun granda plimulto, ili modele kaj sindone laboris kaj jen la rezulto. Jam de la fino de marto Kanado okupis sian lokon ĉe la supro kaj ne plu cedis ĝin. Same, Jugoslavio fine de majo troviĝis ĉe la pinto kaj restis tie. Ambaŭ landoj ricevos kiel premion je sia dispoŝo librodonaĉon laŭ sia elekto en valoro de 100,— n. gld. por disdoni, lotumi aŭ vendi inter siaj delegitoj kaj membroj.

Volonte ni gratulas ankaŭ al la aliaj landoj, kiuj ricevis altan lokon en la vico. Sendube ĉiuj faris sian plejebelon.

Al tiuj landoj, kiuj ne sukcesis atingi 100% de sia kvoto, ni deziras instigi al ĉiam pli energia varbado, malgraŭ eventualaj malfavoraj cirkonstancoj. Ju pli malfacila la laboro, des pli granda la kontentiĝo pro la sukceso!

Kaj nun, por 1957 ek al nova honora batalo!

M. H. VERMAAS

4 POENTOJ PLIAJ...

Lastatempe, kun fervoro kaj entuziasmo, Maroko fariĝis sendependa lando, kiu nun deziras montri al la tuta mondo sian realan sendependecon.

Konstatinte tiujn sentojn, s-ro Thollet (komitatano de UEA por Maroko) starigis amikajn rilatojn kun la franca teknika konsilisto por la urbo Port-Lyautey, s-ro Rovira, kiu petis por li prezenton ĉe la paŝa-urbestro, por ricevi permeson fari en salonego de la urbodomo preleĝon pri UNESKO (konsilitan kaj skizitan de CED). La paŝa urbestro entuziasme akceptis, sed diris ke ĝi devas esti farita en araba lingvo.

Malnova araba lernanto de esperanta kurso, s-ro Berada, akceptis traduki kaj legi la preleĝon. Ĝi okazis en la kinejo „Riad“, antaŭ pli ol 250 ĉeestantoj, kiu plurfoje energie aplaudis.

Inter la ĉeestantoj estis la urbaj estroj de politika partio Istiklal, kiu nun estras la marokan registaron.

La sekvantan tagon, s-ro Thollet legis saman preleĝon en la urbodomo. En la unuaj vicaj sidis la urbestro, la direktantoj de partio Istiklal, kaj la direktoro de la ĉefa liceo, s-ro Voirhaye.

Pro la entuziasmo de lia aŭskultantaro, s-ro Thollet decidis akiri oficialan ateston por favora adopto de helpo al disvastiĝo de Esperanto. Do antaŭ la fino de la preleĝo, kiam li devis raporti pri la decidoj de UNESKO en Montevideo, li asertis, ke Maroko, juna lando sen malnovaj antaŭjuĝoj, devas montri sian sendependecon per disvastigo de la bela idealo de pli bona kompreno inter la homoj.

Adopto de internacia lingvo estas la sola rimedo; tiu lingvo devas esti riĉa, facila, neŭtrala, kaj Esperanto estas la sola, kiu posedas tiujn necesajn kvali-

tojn. Ĝi sola kapablas forigi la barilon de la lingvoj. Maroko, sekvante la konsilojn de UNESKO, estos fiera troviĝi inter la pioniroj de tiu homa progreso. Tio kostos nenion al la maroka budĝeto: sufiĉos aldoni 2 liniojn al la ekzamena regularo, kie fremda lingvo estas devigata. Tiuj du linioj diros: „Ĉiuj kandidatoj kiuj, krom la deviga fremda lingvo, scios la internacian lingvon Esperanto, profitos de 4 poentoj pliaj.“

Ĉiuj ĉeestantoj senescepte montris sian aprobon pri tiu ideo. Tial s-ro Thollet diris, ke oni povos kun pli da aŭtoritato insiste petadi de lia Moŝto la reĝo Mohamed V, pere de la ministro de edukado, la oficialan akcepton de la... 4 poentoj pliaj.

Lertan kaj rapidan elmontradon de Esperanto faris poste s-ro Van Dat, kiu kun f-ino Montet certigos funkciadon de la du kursoj, por kiuj pli ol 80 enskribiĝis.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de januaro 1957

N-ro 290

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de decembro kaj ankaŭ por komparo, je la fino de decembro 1955:

	1955	1956
Asociaj membroj	14617	16670
Individuaj membroj		
MJ	985	958
MA	3995	4406
MS	829	740
Pat.	9	9
DM	295	293
HM	58	54
	20788	23130

Brazilo

Barbacena (Estado de Minas Gerais). D: S-ro Albertino Alves de Almeida, instruisto de angla lingvo, Escola Preparatório de Cadetes do AR.

Salvador (Bahia). FD (Industrio): S-ro Leopoldo Knoedt, Industriisto, Rua Imperatriz 116.

Britujo

Watford (Herts.). D: Vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Brno (Morava). FD (Virinaj Aferoj): S-ino Marie Adamcová, estinta oficistino, Lidická str. 79.

Chmelov (Slovensko). FD (biblia nombro-simbolika): S-ro Zoltán Marencin, paroĥestro, Chmelov apud Gíraltovec.

Jihlava (Moravio). FD (Filatelo): S-ro Frantisek Tichy, gvidanto de filatela vendejo, Brněnská 11.

Martin (Slovakio). FD (Geografio): Inĝ. Stefan Vesely, redaktoro, Hviezdoslavova ul. 2.

Pisek (Cechy). D: S-ro Libor Krivánek, oficisto, Zborocká 1332.

Danlando

Nova ĉef-delegito: S-ro Søren Andresen, instruisto, 6 júlvej 21, Fredericia.

Aarhus. FD (Virinaj Aferoj): S-ino Betty Jensen, Sdr. Ringgade 34 II.

Finnlando

Riihimäki (Hämeenlinna). FD (Fervojaj aferoj): S-ro Matti Seppä, lokomotivhejtisto, Oravankatu 8.

Francujo

Beziers (Hérault). D: S-ro Joseph Salasc, sterkvendisto kaj vinberkulturisto, 5, rue de la Citadelle.

Crévecoeur-le-Grand (Oise). D: D-ro Pierre Berlot, kuracisto, Crévecoeur-le-Grand.

Germanujo

Beuron (Hohenzollern). FD (Katolikismo): S-ro Leo Toloza Oyarzún OSB, benediktana monaĥo, Erzabtei St. Martin.

Detmold (Westfalen). D: S-ro Hans Otterpohl, teknikisto, Lessingstr. 13.

Fischbachau (Oberbayern). D: Vakas.

Hannover. FD (Dentistaferoj): Vakas.

Höxter/Weser (Westfalen). D: S-ro Heinrich Wieners, ortopedia mekanisto, Bahnhof Strasse 7.

Immenstadt (Allgäu, Bavarujo). D: Vakas.

FD (Alpinismo): Vakas.

Mannheim (Baden-Württemberg). VD: S-ro Johannes Radam, lignajisto, Osteroderweg 4.

München (Bayern). FD (Alpinismo): S-ro Hans Wankmüller, uzinestro, Marienwerderstrasse 8.

Verl (Kreis Wiedenbrück). D: S-ro Hugo Wöstemeyer, komercisto, (21a) Verl über Gütersloh.

FD (Katolika janularo): La D.

Italujo

Palermo. D: S-ro Rosario Abate, oficisto, Via Tripoli 15.

VD: S-ino Giuseppina de Vita in Picciotto, instruistino, via de Spuches 30.

Jugoslavujo

Novi Sad (Vojvodino). FD (Juro): F-ino Verica Ignjatovic, jura konsilanto, Ilije Ognjanovica 1, Poštakfo 111.

Nederlando

Oud-Vossemeer (Zeeland). D: S-ro H. de Kuyper, lernejestro, Dorpsweg 15.

Pollando

Mragawo (Mazury). D: Vakas.

Rodezio

Kitwe (Norda Rodezio). D: S-ino Maria M. Green, oficistino, c/o Study Dept. Rhokana Corporation Limited, P.O. Box 137.

Svedujo

Alingsås. FD (Kristanismo): S-ro Ingvar Lagerström, librovendisto, Kungsgatan 33.

Hallsberg (Närke). D: S-ro Erik Olsson, fervojisto, Fredsgatan 15 C.

Svislando

Freiburg, D: S-ro Hans Traber, studanto, 106, route de Marly.
Niederhelfenschwil (St. Gallen). D: Vakas.

Usono

Falmouth (Massachusetts). D: S-ro Ralph Arnold Lewin, sciencisto, Gunning Point Avenue, Sippewissett.

Los Banos (California). D: S-ro John W. Jeffers, eksportisto kaj importisto, 321 L St.

New York. FD (Indiana Kulturo): S-ro George Gabor, kasisto, 733 W. 183 St. Apt. 2-G, New York 33, N.Y.

Oxford (Massachusetts). D: S-ro Andrew I. Rogus, instruisto, 59 So. Main St.

FD (Botaniko): La D.

San Diego (Kalifornio). FD (Instruado): S-ro Norbert T. Cormier, instruisto, 3551 Cowley Way, San Diego 17.

Seattle (Washington). FD (Universitataj Aferoj): D-ro Sidney S. Culbert, Psikologo, Psikologia Fakol, Savery, Universitato de Washington.

Woods Hole (Massachusetts). FD (Biologio): D-ro Ralph Arnold Lewin, sciencisto, Marine Biological Laboratory.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1956

736 Silva, S-ro Moacir Malheiros F., Rio de Janeiro, Brazilo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1957

91 Heilberg, S-ro Leif, Sundbyberg, Svedujo.

92 Julin, S-ro Teodor, Stockholm, Svedujo.

93 Ljungberg, S-ino Astrid, Stockholm, Svedujo.

94 Olsson, F-ino G., Strömsnäsbruk, Svedujo.

95 Olsson, S-ro Olle, Lund, Svedujo.

96 Svård, S-ino Rut, Borås, Svedujo.

97 Wallberg, S-ro Joel, Torsåker, Svedujo.

98 Giannini, S-ro Walter, Zollikoberg, Svislando.

99 Hattemer, S-ro H., Solothurn, Svislando.

100 Hohl, S-ro Jakob, Flims-Dorf, Svislando.

101 Le Brun, S-ro P., Kreuzlingen, Svislando.

102 Perrenoud, D-ro William, Neuchâtel, Svislando.

103 Roth, F-ino Frieda, Solothurn, Svislando.

104 Sandmeier, S-ro H., Zürich, Svislando.

105 Zimmermann, S-ro O. E., Zürich, Svislando.

106 Gomes, S-ro Manuel, Velas, Acoroj.

107 Jelenc, S-ro F., Maison Carrée, Alĝerio.

108 Bernaerts-Toussaint, S-ino L., Antwerpen, Belgujo.

109 Couwenberg, S-ro Fr., Blankenberge, Belgujo.

110 Debrouwere, S-ro G., Kortrijk, Belgujo.

111 Degryse, S-ro André, Roeselare, Belgujo.

112 Geers, F-ino Blanche, Antwerpen, Belgujo.

113 Vermandere, S-ro G., Antwerpen, Belgujo.

114 Ball, S-ro C. R., Leigh-on-Sea, Britujo.

115 Boulton, F-ino M., Stoke-on-Trent, Britujo.

116 Boatman, S-ro Douglas P., West-cliff-on-Sea, Britujo.

117 Buttinger, S-ro Phillip, London, Britujo.

118 Chinn, S-ro C. G., Welwyn Garden City, Britujo.

119 Collinson, Prof. W. E., Liverpool, Britujo.

120 McDonald, S-ro R. J., Gloucester, Britujo.

121 Elderkin, S-ro T., Reading, Britujo.

122 Fraser, S-ro T. C., Kirkcaldy, Britujo.

123 Goulding, S-ro E. Irvine, Woking, Britujo.

124 Grocott, S-ro J. R., Blackburn, Britujo.

125 Leather, S-ro A. J., Blackburn, Britujo.

126 Middlemast, S-ro Arthur H., Bour-nemouth, Britujo.

127 Mills, F-ino Constance, Denton, Britujo.

128 Moberly, S-ro E. W., London, Britujo.

129 Preedy, S-ro Geo L., Little Wit-combe, Britujo.

130 Saunders, S-ino A. J., Ventnor, Britujo.

131 Shield, S-ro W. J., Wallasey, Britujo.

132 Williams, S-ro Norman, Manchester, Britujo.

133 Jensen, S-ro Gorm Eskjaer, Faxe, Danlando.

134 Jørgensen, S-ro Gunnar, Skovstrade, Danlando.

135 Larsen, S-ro L., Odense, Danlando.

136 Møller, S-ino Ellen, Fåborg, Danlando.

137 Ohrberg, S-ro P. M., Nykøbing-F., Danlando.

138 Petersen, F-ino Anna, København, Danlando.

139 Trier, S-ro B. S., Haslev, Danlando.

140 Vaarst, S-ro Emil, Aalborg, Danlando.

141 Zacho, S-ino Birthe, Brønshøj, Danlando.

142 Bastien, Int.-Gen. L., Paris, Francujo.

143 Bernard, S-ro R., Bois-Colombes, Francujo.

144 Borel, S-ro Emile, Arles-sur-Rhône, Francujo.

145 Crochet, S-ro M., Epernay, Francujo.

146 Lemonnier, F-ino Germaine, Asnières, Francujo.

147 Ploussu, S-ro A., Grenoble, Francujo.

148 Poly, S-ro P., Paris, Francujo.

149 Prud'hon, S-ro G., Fontenay sur Bois, Francujo.

150 Tresorier, S-ino, Besançon, Francujo.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de
la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformato
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonon:
En Francujo: R. Fiquet, Poŝta
konto 2259-98 Marseille
Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj
landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: 7, Av. Léon-Gourault Choisy-le Roi (Seine)	Administracio: 5. Bd. Stalingrad Nice (A-M) Francujo.
--	--

151 Bily, S-ro Harry, Berlin, Germanujo.

152 Frick, F-ino Kate, Wiesbaden, Germanujo.

153 Gerwin, Jr., S-ro R., Lobberich b. Krefeld, Germanujo.

154 Grundhoff, S-ro Josef, Wuppertal-Barmen, Germanujo.

155 Gscheidel-Pauli, S-ino, H., Crailsheim, Germanujo.

156 Helfers, S-ro F., Karlsruhe, Germanujo.

157 Krause, S-ro Walter, Berlin-Charlottenburg, Germanujo.

158 Ley, S-ro Woldemar von der, Tailfingen, Germanujo.

159 Orterer, F-ino Anna Maria, Kreuth b. Tegernsee, Germanujo.

160 Pilhofer, S-ro Otto, Nürnberg, Germanujo.

161 Raab, S-ro Johann M., Nürnberg, Germanujo.

162 Sandrock, S-ro Otto, Essen, Germanujo.

163 Schönrich, S-ro K., Wiesbaden, Germanujo.

164 Starke, S-ro Alexander, Erlangen, Germanujo.

165 Wagner, S-ro Hermann, Oberstdorf i. Allgäu, Germanujo.

166 Wehrheim, D-ro H., Hildesheim, Germanujo.

167 Alberich-Jofre, S-ro S., Barcelona, Hispanujo.

168 Berghaenel, S-ro Conrado, Barcelona, Hispanujo.

169 Linás Bellvehi, S-ro A., La Laguna, Kanariaj Insuloj.

170 Pastor-Zarraonandia, S-ro A., Bilbao, Hispanujo.

171 Ullar, S-ro Nicomedas, Barcelona, Hispanujo.

72 Perini, S-ro Gustavo, Belluno, Ita-
73 S-ro W., Utrecht, Neder-
74 Boelama, S-ro P. A., Haarlem,
Nederlando.
75 Douglas, S-ro H. F. K., Rijswijk,
Nederlando.
76 Jong, S-ro G. de, Huizum bij Leeu-
warden, Nederlando.
77 Mook, S-ro W. H., Groningen,
Nederlando.
78 Salberg, S-ro Erik E., Selce, Jugo-
slavujo.
79 Wierckx, S-ro C., Rotterdam, Neder-
lando.
80 Woessink, S-ro E. J., Arnhem,
Nederlando.
81 Azevedo, D-ro Celestino de, Vila
Real, Portugalujo.

182 Oliveira, S-ro B. A. S. C. de, Lis-
boa, Portugalujo.
183 Woodruff, S-ro E. W., Johannes-
burg, Sud-Afriko.
184 Ahlgren, S-ro A., Göteborg, Sve-
dujo.
185 Almén, S-ro P., Hällefors, Svedujo.
186 Berg, S-ro Axel, Göteborg, Svedujo.
187 Ek, S-ro Axel, Hässleholm, Svedujo.

PATRONO 1957

2 Harry, S-ro Ralph, Singapore, Ma-
lajo.

DONACOJ GENERALA KASO

J. H. Murray 22,64 gld.; R. Barta 1,90
gld.; A. Rogus 1,90 gld.; S-ino M. Carls-
son 2,75 gld.

DONACO FONDAJO-EKSPOZICIO

A. Wesser 4,62 gld.

DONACOJ A.P.O.

F. Charlet 10,80 gld.; H. Groenendijk
2,50 gld.; prof. H. H. Rissom 10.— gld.

NOVAJ KOMITATANOJ

Guillaume, Jean, 8 rue Camille Saulnier,
Le Vésinet (S & O), Francujo.
Smith, Norman R., 20 Whalley Avenue,
Davyhulme, Manchester, Britujo.

KORAJN BONDEZIROJN!

Okaze de Kristnasko kaj la Nova Jaro
atingis la oficejan stabon amaso da bon-
deziroj el ĉiuj anguloj de la mondo. Ne
eblas persone respondi ĉiujn. Tial ni ĉi
tie plej kore dankas kaj varme reciproke
bondeziras al ĉiuj sendintoj.

M. H. Vermaas,
Direktorino de la C.O.

ANONCETOJ

Interŝanĝas poŝtmarkojn tutmonde kvan-
ta kontraŭ kvanto, S-ro Rovira, Str.
Ejército Espanol 45, Sabadell (Bar-
celona), Hispanujo.

Wladislaw Walicki, Lodz 1, Sienkiewicza
str. 32, Pollando, librokorektisto, dezi-
ras korespondi tutmonde diverse.
Precipe pri grafologio, turismo, historio
interŝanĝi librojn, gazetojn.

Henry Stume, 10 Walpole Street, Swan-
burne, W. Aŭstralio, deziras interŝanĝi
poŝtmarkojn.

Deziras komenci esperantan teozofian
gazeton pri teozofio, filozofio, religio
ktp. Estontaj leguloj kaj skribuloj bon-
volu skribi al S-ro A. Kelly, 34 Stan-
hope Rd., St. Albans, Herts., Britujo.

Ankaŭ 60 diversaĝaj gekursanoj de Es-
peranto esprimis deziron korespondadi
tute tuta mondo. Respondo garantiata.
Sribu amase. Landoj ekstereŭropaj
ne vian aktivecon ankaŭ per koloraj
Bildkartoj bele afrankitaj por vekigi in-
tereson ne nur ĉe gekursanoj, sed por
pagandcelo ankaŭ. Kursgvidanto: Do-
ktor Piotr (DOKP), Gdansk, ul. Dy-
wizyjna 2-4, Pollando.

Ŝtataj korespondantoj pri okultismo,
okcidenta magio, kirognomonio, kiromancio,
historio de historio magiaj artoj mal-
modernaj tempoj. Prof-ino Alma
Zulian, Via Cibrario 41, Torino,
Italio.

Fraŭlino 22 jara deziras korespondi
al ĉiuj landoj, letere kaj ilpk. Adreso:
Teresa, Łódź 9, Zachodnia 33/1,
Pollando.

Edo Veldemar Vitkin, esperanta kurs-
gvidanto, Kalevi 51-2, Pärnu, Estonia
R. Sovetunio, deziras ricevi por ge-
neralaj leterojn pri ĉiuj temoj, ilustrit-
ajn poŝtkartojn, esperantajn kaj naci-
onajn gazetojn el ĉiuj landoj. Ĉiu
respondon. Plue, por unua provo
ekspozicio li petas alsendon de ĉiuj
materialoj, presajoj kaj aliaj materialoj.

Deziras korespondi kun la esperantistoj

el la tuta mondo: F-ino Stojanka Mila-
novksa, str. „11 novembro” 134 kaj s-ro
Petar Nikolovski, str. D. Daković 5, am-
baŭ el Kumanovo, Jugoslavio.

La esperanta klubo en Arnemo deziras
aranĝi letervesperon en la fino de aprilo.
Bonvolu skribi al ĉiuj mondpartoj. Adre-
so: S-ino A. M. van der Wal, Roden-
burgstraat 21 III, Arnhem, Nederlando.

S-ro B. Ehrlich, Box 2190, G.P.O., Syd-
ney, Aŭstralio, korespondos esperante,
france, germane aŭ pole kun personoj
kiuj ludas iun ajn muzik-instrumenton
precipe la blok-fluton (Blockflöte, Re-
corder, English Flute, Flüte à bec, Flau-
to Dolce). Interŝanĝos muziknotojn taŭ-
gajn por blok-fluto aŭ voĉo: ĉiaspecaj
kantoj ktp. Sendos ankaŭ poŝtmarkojn
ŝanĝe je tiaj muzik-notoj (NE plu kolek-
tas poŝtmarkojn). Ne pre respondos sed
sendos nenion antaŭe.

Kiu junul(in)o ŝatus elmigri al Kanado,
vivi en nia harmonia familio kaj tie ak-
tive labori por Esperanto? Ni estas 34-
kaj 31-jaraj geedzoj kun dujara filo (de-
naska esperantisto) kaj elmigris el Ger-
manujo antaŭ kvar jaroj. Ni ĵus aĉetis
ofsetan presmaŝinon kaj fondis la mal-
grandan firmon „Esperanto-Press”. Por
ke ni povu eldoni pli da libroj kaj pres-
aĵoj mi serĉas esperantist(in)on, kiu
helpas funkciigi la maŝinon, komposti
tekstojn ktp. Presezaj spertoj ne necesas,
sed la gvidmotivoj de la elektota per-
sono estu la niaj: Serĉado de la vero
per kritika esplorado kaj sindevigo al
laboro por la bono de la homaro. Nia
pli fora celo estas fondo de koopera
esperanta kulturdomo. Ni pagos vojaĝ-
kostojn kaj komence poŝmonon. Ges-roj
Eichholz, 133 Service Road, Oakville,
Ontario, Kanado.

Ni lernas Esperanton jam proksimume
DU monatojn. Ni estas studentoj de di-
versaj fakoj kaj ni deziras korespondi
kun esperantistoj el ĉiuj landoj, precipe
kun gejunuloj pri ĉiuj temoj. Bulgario,
Sofio, poŝtk. 66. (Kurso de Esperanto
en la Univers.)

Interstene korespondas pri temoj religiaj,
moralaj kaj similaj P. Giacinto Jacobitti,
S. Domenico, Siena, Italujo.

20 gekomencantoj, 11—12-jaraj deziras
korespondi provozire per il.p. f-ino B.
F. Kliphuis, Zuiderlaan 50, Hoogezand,
Nederlando.

Pli ol 120 diversaĝaj kursanoj deziras
korespondi kun ĉiuj landoj. Sribu amase,
vi certe ricevos respondon. Adreso:
Georgio Michalik, kursgvidanto, Szero-
ka 17 m. 5, Gdansk, Pollando.

Aĉetas informojn pri geografio de l'indu-
strio de l' bakita argilo (tegoloj, brikoj,
ktp.). R. Gérard, 451 rue Vouillé, Paris
XV.

Pri socialaj kaj sanitaraj problemoj de
malsanuloj kun internaj malsanoj deziras
korespondi prezidanto de la porinteresa
centro de invalidoj — internuloj en Ĉe-
hoslovakio: Josef Ambroz, Špačkova 3,
Brno 15.

Esperantistoj kiuj deziras ricevi inform-
ojn pri la celoj kaj agoj de „Libervola
Internacia Civila Servo” skribu al:
S.C.V.I., 77 Boulevard Jean Jaurès,
Clichy (Seine), Francujo.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito
kaj matenmanĝo po 14 s 6 p por ĉiu
nokto. Prezoj malaltigis laŭ loĝdaŭro.
Oni parolas Esperanton kaj la francan.
A. Bytheway, „Flat Four”, 1, Warring-
ton Crescent, LONDON W.9, Anglujo,
Telefono CLUNningham 4487.

Koresponda Servo Mondskala havigas
korespondantojn el pli ol 30 landoj laŭ-
dezire. Sribu, indikante vian aĝon kaj
aldonante respondkuponon al: Daniel
LUEZ, Boulevard Brossolette, LAON
(Aisne), Francujo. Naciaj Esperanto-
gazetoj bonvolu afable represi tiun ĉi
anoncon.

Novzelando klubo bezonas materialon
por ekspozicio: bildkartojn, flugfoliojn,
glumarkojn, ktp. Bildkartoj interŝanĝe:
Al Cpl. H. W. Smith, Camp Hospital,
Trentham.

31 jara sinjoro deziras korespondi per
magnetofono, en tutmondo. La rapido de
la magnetofono estas 3/4 kaj 1/8. Res-
pondo al Haroldo W. Smith, Camp
Hospital, Trentham, Novzelando.

Aperis nova esperantlingva numero de la belega kolore ilustrita kultura revuo

„POLLANDO”

prezo: 1 gld.

MENDU ĜIN ĈE U.E.A.!

*

La Kopenhagaj Kongresanoj jam ekkonis kaj admiris la unuan numeron.

En 1957

„POLLANDO”

aperadas ĉiumonate en Esperanto

abonprezo: 12,- gld.

ABONU ĜIN PERE DE U.E.A.!

Aperis

„VARSOVIO”

belega foto-albumo pri la urbo antaŭ la detruo, dum la milito kaj post la rekonstruo.

Prezo: 2,- gld.

MENDU ĜIN PERE DE U.E.A.!

*

Aĉetu ĝin por havigi al vi tiun gravan kulturen dokumenton en Esperanto kaj por samtempe helpi la Movadon en Pollando. Viaj mendoj ebligas al la polaj samideanoj aĉeti esperantajn librojn en okcidento.

LA ELDONAĴOJ PLENE VALORAS
LA TRE MALALTAN PREZON

SENSACIA!

KULTURAJ INTERNACIAJ FERIOJ

Kun: Profesoroj LAPENNA - WARINGHIEN
D-ro ALBAULT - Inĝ. WATIER
Mag. AULD

LA EVOLIO DE L' CIVILIZOJ KAJ LA MODERNA SOCIO

Prelegoj - Kulturaj ekskursoj - Debatoj
ĉe

KASTELO GRESILLON



14-an - 24-an Julio 1957

*Petu informilon kaj kompletan programon de
la Prezidanto de la Kulturdomo,*

Kastelo Grésillon - Baugé - M & L - Francujo

FRUA ALIĜO ESTAS KONSILINDA!

Esperantistaj-negocistoj ĉiulandaj serĉataj de sveda fabriko por interesa kaj profitodona negocado je patentitaj poraŭtaj transportiloj, kiuj en Svedlando havis grandan sukceson. „Brilo” pakajtenilo estas la plej genia kaj praktika tenilo de la tuta mondo. Kunpuŝita ĝi en sia ĥromumita eksteraĵo ornamas ĉiun aŭton. „Transporter” la kunpuŝebla transportilo kun de- kaj almetebla rado, kiu je nebezono havas lokon en la kofro. En 30 sekundoj oni per „nenio” kreas ŝarĝaŭton el persona aŭto.



Grandaj merkato kaj enspezado
por iniciativemaj negocistoj
ĉiulandaj

Järn & Stålprodukter

BORÅS - SVEDLANDO

Kroatia Esperanto Ligo eldonis libreton:

TEATRO EN SOCIETO

Aŭtoroj: E. Lapenna, M. Mamuzić, S. Mulo.
Mallongaj originalaj teatraĵoj ludeblaj en societejoj,
distre-karakteraj.

Scenejo, kulisoj, teatraĵoj kostumoj nebezonaĵ.
Konvena helpilo en laboro kun gejunuloj.
Programeroj por Zamenhofaj-vesperoj.
Legajo por konversaciaj kursoj.

Prezo: en Jugoslavio 120 Din, en eksterlando 2 ned.
guldenoj.

MENDU ĜIN ĈE U.E.A.

Reprezentantoj, kiuj interesiĝas pri profitdona
vendo de bonkvalitaj germanaj produktoj:
betonhardigilo, desinfektilo, aeroplbonigilo,
solvilo por kaldronŝtono, dekrustado de
komunumaj akvo-tubo, ktp. skribu al:

Chemische Fabrik CRAILSHEIM, Germanujo

Ĉu vi serĉas esp. libron; eble mi havas aŭ havos Stokon
mi havas de la libroj: Baghy kaj Kalocsay, Arĝenta Duopo
dua volumo 2 50, Baghy, Sur sanga tero, 264 paĝa 4.50;
Baghy, La verda koro, 94 paĝa 1.75; Szilagy, Ellernu
112 paĝa 2.00; Földas, La strato, de la fiŝanta kato,
268 paĝa 4.50; Vernyi, Dion adori, 64 paĝa 0.95
Prezoj en ned. gld. Revendistoj kaj libroservoj 20%
da rabato ĉe mendo de minimume 2 ekzempleroj. Send-
kostoj por la sendinto.

H. VEENSTRA - J. M. Kemperstraat 28, Amsterdam, Nederlando

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam